

ESPERANTO

INFORMOI

FERVOJISTOJ:

DIPL. ING. FRITZ TSCHOM KAJ DR JOSEFINE TSCHOM

WALDEGESTRASSE 93 TEL 2 68 11/325 (HAW)

HANS KAJ OTTI BÜRGER. COETHESTRASSE 84 TEL. 2 5 80 91

HANS KAJ MEUTTA GEROLDINGER, MARCUSGASSE 9 TEL 6195 35

U.E.A. - DELEGITO:

HELMUTH GERBERT LINZ-URFAHR, BLÜTENSTRASSE 3, TEL 3193 81

S.A.T. - PERANTO:

MAX HOLLINGER, GRUBERSTRASSE 85 1. et. étage

GRUPO - FERVOJISTA

- " - - ESTONTO

KOMUNA KUNVENO: JAUDE, JE LA 20 a.


JUNGWIRTHSTRASSE 6
(5 MINUTO IN DE CUTIE)

SERVO




ESPERANTO

DIE INTERNATIONALE SPRACHE



**DIE
ZWEITE
SPRACHE
FÜR
JEDEN**



ESPERANTO

MARTO 1962

55 a Jaro - N-ro 676 (3)

esperanto

MARTO 1962

55 a JARO

REVUO INTERNACIA

N-RO 676 - (3)

Fondinto : H. HODLER

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro : W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannanshire), Skotlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono : (010) 32788. Ĝirkonto: 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represadon al nia redakcio.

Jara abono (1962) : 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en pli ol 80 landoj.

Estrarado de U.E.A. :

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

LA FRONTPAĜA BILDO :

Esperanto-informtabulo en la alvenhalo de la ĉefstacidomo en Linz/D. La tabulo estas pentrita de s-ro H. Bürger. La Aŭstria Federacio Esperantista Fervojista havas la permeson fiksi Esperanto-informtabulon en ĉiu fervoja stacidomo se en la koncerna loko troviĝas respondeca esperantisto, kaj ĝis nun en Aŭstrujo estas fiksitaj proksimume 50 tiaj. (Foto : Joh. Geroldinger).

Enhavo

La nova laborplano de UEA	41
Projekto : Dua Baza Laborplano de UEA	42
Neŭtraleco. N .R. Smith	45
La evoluo de la esperanta poezio (I) (W. Auld)	47
Filmo en Esperanto : Ĝermoj de lumo	52
Unika jubileo	55
Zamenhof-aleo en Dordrecht	55
Por la nova domo de UEA	57
Statistiko pri la membraro 1961	58

Rubrikoj

La internaciaj konkursoj 1962	46
Ricevitaj libroj	46
Novaj libroj	50
Ŝaka rubriko	52
CED	53
La juna vivo	56
Tra la mondo	58
Esperantista vivo & Nekrologo	60
Radio	60
Oficiala informilo	60

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

LA NOVA LABORPLANO DE U.E.A.

En tiu-ĉi numero estas publikigita la projekto de la Dua Baza Laborplano de U.E.A. Kiel dirite en la enkonduko, la Unua Laborplano estis akceptita en Bologna kaj iom post iom realigita ĝis maksimumo. La spertoj montris, ke el ĉiuj vidpunktoj estas utile plani la estontajn agadojn, kunligadi la unuopajn taskojn, kondukadi celkonscie la Esperanto-Movadon al konkretaj celoj. La atingoj de U.E.A. en la lastaj jaroj ŝuldiĝas grandparte al la fakto, ke ĝi havis klaran perspektivon de agado surbaze de la Unua Laborplano. Nun, en la ŝanĝitaj cirkonstancoj en la mondo kaj post la efektivigo de la ĉefaj taskoj formulitaj en la Unua Laborplano, maturiĝis la kondiĉoj por ellabori novan koncizan planon de agado por la sekvantaj jaroj. Tio estas des pli utila, ĉar en tiu-ĉi jaro okazas la elektoj de la Komitato, Estraro kaj aliaj organoj de la Asocio.

La publikigita teksto estas nur projekto, ellaborita en la senco de la art. 30 de la Statuto de U.E.A. La projekton diskutos la Estraro dum la kunsidoj de la 14-a kaj 15-a de aprilo, faros eventuale en ĝi ŝanĝojn kaj kompletigojn, kaj prezentos post tio la projekton al la nova Komitato de U.E.A. por akcepto. Tute certe la Komitato, kiu havos siajn kunsidojn dum la U.K. en Kopenhago, elektos specialan komisionon por trastudo de la projekto kaj prezento de definitiva propono al la tuta Komitato. Nur post la akcepto fare de la Komitato la Dua Baza Laborplano fariĝos deviga plano de agado por la tuta U.E.A. Ekde tiu momento ĉiuj organoj de U.E.A., sed tute speciale la Komitato kaj la Estraro, ĉiuj organizaĵoj apartenantaj al U.E.A. en tiu aŭ alia formo, kaj ĉiuj iliaj organoj devos klopodi efektivigi la Laborplanon kiel eble plej komplete kaj rapide.

Por ebligi efikan diskutadon kaj por faciligi la superrigardon, la Laborplano estas dividita en 5 partoj kaj 28 punktoj. Superflue diri, ke estas absolute maleble — kaj ankaŭ tute ne necese — plene disigi unu eron de la alia, aŭ unu parton de la alia. La plenumo de la internaj taskoj evidente influas la plenumon de eksteraj, kaj inverse. Iuj punktoj samtempe apartenas al eksteraj kaj internaj taskoj. Aliaj estas plenumebaj nur kune fare de la centraj organoj de U.E.A. kaj de la landaj asocioj, aŭ ankaŭ de la lokaj grupoj aŭ fakaj organizaĵoj. Kelkaj punktoj, aliflanke, povas esti plenumitaj nur de la centraj organoj de U.E.A., aŭ nur de la landaj asocioj, aŭ lokaj societoj, aŭ fakaj organizaĵoj. Tamen, ĉiam estas necese rigardi unuopan eron de la programo kiel parton de la tuto, kaj ĉiun plenumendan taskon kiel konsistan parton de la tuta komuna agado, kies celo estas progresigi la Esperanto-Movadon ĉie en la mondo kaj konsiderinde disvastigi la

Internacian Lingvon en la sekvantaj jaroj, ĉio-ĉi en la intereso de la grandaj idealoj pro kiuj formiĝis kaj ekzistas la Esperanto-organizaĵoj, kaj por pli granda persona avantaĝo de ĉiu unuopulo, kiu scias aŭ baldaŭ ellernos la Internacian Lingvon.

Por ke la Plano estu kiel eble plej komplete kaj realeca, estas necese ke ĉiuj landaj asocioj, fakaj organizaĵoj kaj lokaj societoj plej atente diskutu la publikigitan projekton kaj faru sugestojn pri ŝanĝoj, aldonoj aŭ ĝenerale plibonigoj. *La landaj asocioj kaj fakaj organizaĵoj* transdonu siajn proponojn al la komitatanoj aŭ, en kazo de ankoraŭ nealiĝintaj organizaĵoj, al la Estraro de U.E.A. pere de la Ĝenerala Sekretario. La landaj asocioj kaj fakaj organizaĵoj dediĉu apartan atenton al la punktoj 12, 14, 25 kaj 27 de la projekto, ĉar tiuj punktoj plej rekte koncernas ilin. Sialtice, *la lokaj societoj* precipe atentu la punktojn 13 kaj 26. La lokaj grupoj sendu siajn eventualajn proponojn al siaj landaj asocioj. Nur escepte — se ne ekzistas landa asocio en la koncerna regno — la proponoj de la lokaj societoj estu rekte senditaj al la Estraro de U.E.A. pere de la Ĝenerala Sekretario.

La lokaj grupoj estas aparte gravaj en la tuta sistemo de la Esperanto-organizaĵoj. Ili estas la fundamentaj ŝtonoj, sur kiuj kuŝas la tuta granda konstruaĵo de la organizita Esperanto-Movado. La plena realigo de la Plano dependas grandparte de tio ĉu la lokaj societoj plenumos konsciece tiujn taskojn, kiujn nur ili povas efektivigi. Tial, diference de la Unua Laborplano, la nuna aparte traktas la agadon de la lokaj societoj. Pro la sama kaŭzo la Estraro de U.E.A. decidis, ke la Unua Ĝenerala Kunveno de la Universala Kongreso en Kopenhago pritraktu la temon "*La Rolo de la Lokaj Grupoj en la Nova Laborprogramo de U.E.A.*" Necesas, do, ke ĉiuj lokaj societoj pritraktu dum aparta kunveno ankaŭ tiun punkton, diskutu la aferon kiel eble plej vaste kaj donu klarajn direktivojn al siaj reprezentantoj, kiuj partoprenos la laboron de la menciita kunveno en Kopenhago. La laboro de tiu kunveno povos esti fruktodona nur se partoprenos multaj reprezentantoj de la lokaj societoj kaj se ĉiuj estos bone preparitaj.

En Kopenhago finiĝos plia sukcesplena etapo en la historio de la Internacia Lingvo. Tie ankaŭ komenciĝos nova periodo, kiu tute certe estos ankoraŭ pli sukcesa, se ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj ĉiu unuopa esperantisto kontribuos sian parton aŭ eĉ nur ereton por la realigo de la nova Laborplano.

I. L.

DUA BAZA LABORPLANO DE U.E.A.

I. ENKONDUKO

1. **Laborplano 1955** : La konataj decidoj de UNESKO fine de 1954 necesigis sistemigon de la laboro de U.E.A. kaj de ĉiuj organizaĵoj apartenantaj al ĝi en tiu aŭ alia formo. Tiucele estis ellaborita la Baza Laborplano de U.E.A. kaj prezentita al la Komitato, kiu akceptis ĝin dum la Kongreso de Bologna en la jaro 1955. Ĝi estis la unua Laborplano de la Asocio kaj ĝi ebligis celtrafan agadon en la periodo 1955-1962.

2. **Realigoj** : La Raportoj de la Estraro por la laborjaroj 1955/1956 ĝis 1961/1962, publikigitaj en la Jarlibro, entenas la ĉefajn atingojn de la Asocio kaj ĝenerale de la Esperanto-Movado en la menciita periodo. Kelkaj eroj de la Plano ne povis realiĝi, ĉefe pro kaŭzoj ekster la povo de la respondecaj organoj de U.E.A., sed, aliflanke, multaj aliaj punktoj, neantaŭviditaj en la Plano, povis esti sukcese plenumitaj. Ĝenerale parolante, la ĉefa celo de la plano estas atingita. Ekstere la pozicioj de la Internacia Lingvo konsiderinde pliboniĝis kaj la prestiĝo de U.E.A. kiel reprezentanto de la neŭtrala Esperanto-Movado multe altiĝis. Interne la Asocio fortikiĝis: organize kaj ideoj. Rezulte la membraro preskaŭ duobliĝis. Pro la plenumo de la taskoj antaŭviditaj en la Unua Baza Laborplano, kiel ankaŭ pro la ŝanĝitaj cirkonstancoj en la mondo, necesas fiksi en nova Baza Laborplano la principojn de agado en la sekvanta periodo.

II. CELO

3. **Premisoj** : Ĉiu, kiu objektive rigardas la realaĵojn en la hodiaŭa mondo, facile povas konstati, ke la homaro ĉiam pli kaj pli bezonas rimedon de komunikado por ĉiuj internaciaj rilatoj, daŭre ampleksiĝantaj kaj profundiĝantaj. Estas same klare, ke tiun bezonon povas plene kontentigi nek unu aŭ pluraj naciaj lingvoj, nek la nuntempaj sistemoj de tradukado kaj interpretado, nek la plej modernaj tradukmaŝinoj, sed sole vivanta, ĝis maksimumo nuancita, plensanga kultura lingvo. Bazante sin sur tiuj du premisoj kaj konante perfekte la nunan evolustadion de la Internacia Lingvo kaj ĝiajn senfinajn evolu-eblecojn, la organizita Esperanto-Movado estas konvinkita, ke precize la Internacia Lingvo prezentas la solvon de la lingva problemo en mondaj kadroj kaj ke tial pli aŭ malpli frue devas veni la tempo kiam ĝi estos aplikata en ĉiuj internaciaj rilatoj, sur ĉiuj niveloj.

4. **Organizita agado** : Rezulte, necesas, unuflanke, daŭre evoluigadi la Internacian Lingvon rigore konservante kaj fortikigante la lingvounuecon, por ke en ĉiu momento ĝi povu kontentigi ĉiujn bezonojn de internacia komunikado, kaj, aliflanke, konscie, organizite kaj paralele vastigi la scion kaj la praktikajn aplikojn de la lingvo en ĉiuj sferoj. Neniu povas antaŭvidi kiam precize la utiligo de la Internacia Lingvo ĝeneraliĝos, ĉar tio dependas de multaj faktoroj, el kiuj la plej granda parto troviĝas tute ekster la atingopovo de la Esperanto-Movado, sed tute certe la kondiĉoj por tio ĉiam pli maturiĝos. Tial estas eble almenaŭ ĝis certa grado influi la solvon kaj plirapidigi la procezon per konsiderinda altigo de la nombro de personoj mastrantaj la lingvon, kio aŭtomate vastigas la kampon de ĉiaspecaj praktikaj aplikoj kaj, krome, ebligas ankaŭ konscian vastigon de tiuj

praktikaj utiligoj. Siavice tio devas fortikigi ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, sekve ebligi novajn agadojn kaj intervenojn kun pli da efiko, kio ne povas ne reflektiĝi en la plua disvastiĝado de la lingvo. Ĉio ĉi estas firme kunligita, sed estas necesa la elemento de konscie organizita agado por sukcesplene rapidigi la funkciadon de tiu maŝinaro de reciproka influado. La nova Baza Laborplano plenumas tiun taskon. Ĝi prezentas komunan framon por la agado de ĉiuj organoj de U.E.A., de la aliĝintaj asocioj, de la kunlaborantaj fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj, de la lokaj societoj kaj unuopaj membroj. Ĝi montras la vojon al la fina celo — la ĝeneraligo de la uzo de Esperanto en la internaciaj rilatoj — la internajn kaj eksterajn taskojn plenumendajn en la nuna stadio, kaj la labormetodojn aplikendajn por efike proksimiĝi al tiu celo.

III. INTERNAJ TASKOJ

A. U.E.A.

5. **Organiza plifortigo** : (a) Plene ordigi la novan domon en Rotterdam, ankoraŭ plimodernigi la oficejon per nuntempaj oficejaj instrumentoj, eventuale per malgranda moderna presmaŝino por publikigo de diversaj bultenoj kaj informaj materialoj; (b) instigi donacadon per unuopaj ĉambroj en la domo (5.000 ned. guld.), kiuj ricevos nomon laŭ la deziroj de la donacintoj; (c) ordigi kaj daŭre kompletigadi la bibliotekon tiel ke ĝi estu maksimume ĝisdata; (d) aligi al U.E.A. ĉiujn ekzistantajn landajn asociojn kaj instigi la fakajn aliĝi laŭ samaj kondiĉoj (art. 14 en la Statuto); (e) iniciati kaj helpi la organizon de novaj landaj kaj fakaj asocioj; (f) konsiderinde altigi la nombron de individuaj membroj, laŭ ebleco minimume al 15.000; (g) altigi la nombron de asociaj membroj laŭ ebleco al 35.000; (h) utiligi la kategorion de "apogantoj" kaj "apogantaj organizaĵoj" por havigi al U.E.A. la subtenon de simpatiantaj organizaĵoj kaj almenaŭ 50.000 unuopaj apogantoj; (i) fortikigi TEJO kaj doni al ĝi efikan helpon en la disvastigo de la Internacia Lingvo inter la junularo; (j) duobligi la nombron de delegitoj kaj fakaj delegitoj; (k) paralele kun la efektiva kresko de la membro-nombro kaj grandigo de la laboro en la C.O. pligrandigi la nombron de geoficistoj en la C.O.; (l) nepre atingi pli fortan internan disciplinon, tiel ke ĉiu organo, funkciulo aŭ oficisto de la Asocio plenumu precize, akurate kaj ĝustatempe siajn taskojn kaj devojn kaj ke, aliflanke, la unuopaj lokaj grupoj kaj individuaj membroj turnu sin unuavice al siaj respektivaj landaj aŭ fakaj asocioj, komitatanoj kaj lokaj organizaĵoj senŝargigante tiamaniere la centrajn organojn de laboroj, kiuj apartenas al la landaj asocioj, fakaj organizaĵoj aŭ lokaj grupoj.

6. **Informado** : (a) Intensigi la agadon surbaze de la Principaro de Frostavallen (vidu la Jarlibron de U.E.A., 1959, p. 186), kiu formas konsistan parton de tiu ĉi Laborplano; (b) dediĉi precipan atenton al agado en Azio kaj Afriko (specialaj broŝuroj, flugfolioj, prelegoj, havigo de instruistoj, lernolibroj, fondo de grupoj kaj landaj asocioj); (c) instigi la landajn asociojn kaj lokajn grupojn realigi la ideojn kaj sugestojn, kiujn entenas la Principaro de Frostavallen; (d) instigi la interŝanĝadon de spertoj; (e) aranĝi konferencojn de la informaj fakoj kaj specialistoj pri informado kun la celo daŭre plibonigadi la enhavon kaj metodojn de informado.

7. **Lingvo** : (a) Rigore konservi kaj fortikigi la lingvounecon surbaze de la Zamenhofa Fundamento klare distingante inter la necesa aŭ utila evoluigo de Esperanto kaj la danĝera deformado de ĝiaj bazaj strukturaj trajtoj laŭ la Fundamento; (b) atenti, ke ĉiuj publikaĵoj de U.E.A. estu absolute senriproĉaj el lingva vidpunkto; (c) kritike rilati al ĉio, kio malaltigas la lingvan nivelon; (d) konservi kaj konscie intensigi la vivantecon de la lingvo per instigoj al uzado de Esperanto ne nur okaze de internaciaj renkontiĝoj, sed en ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, iliaj organoj kaj inter unuopuloj; (e) ankoraŭ plibonigi la nivelon de la lingvo-instruado per organizo de internaciaj kursoj por kursgvidantoj; kontrolado de lernolibroj kaj rigora kritiko de lernolibroj kaj vortaroj, kiuj deformas la lingvon; publikigado de lernolibroj por lingvoj, en kiuj ili ankoraŭ ne ekzistas; kunligado de lernejoj en kiuj la Internacia Lingvo estas instruata; instigado al organizo de konversaciaj kursoj; aligado de la kursfinintoj al Esperanto-organizaĵoj, inkluzive U.E.A.; plua evoluigo de la internaciaj ekzamenoj kaj instigado al diplomigo.

8. **C.E.D.** : Nepre konservi kaj fortikigi C.E.D. kiel specialan sciencan-esploran institucion de la Esperanto-Movado kaj ne miksi ĝian laboron kun la aliaj agadoj, speciale ne kun tiu de la branĉo informado.

9. **Kongresoj kaj konferencoj** : (a) Plue evoluigi la U.K. konservante la nunan bazan strukturon, tiel ke ili fariĝu ĉiam pli atentataj mondaĵ kulturaj manifestacioj; (b) ligi al U.K. specialajn aranĝojn, ekzemple artajn festivalojn, konferencojn de sciencistoj aŭ teknikistoj, kiam ajn la cirkonstancoj tion permesas; (c) organizi aŭ helpi la organizon de kiel eble plej multaj internaciaj konferencoj de specialistoj, seminarioj, diskutrondoj kaj similaj aranĝoj, en kiuj estas traktataj internacie interesaj problemoj, kaj utiligo de tiaj aranĝoj ankaŭ por informado en neesperantistaj fakaj medioj.

10. **Publikaĵoj** : (a) Ampleksigi kaj paralele plibonigi la revuon "Esperanto"; (b) daŭrigi la eldonadon de la Jarlibro en du partoj kaj ampleksigi ĝin paralele kun la nombrokresko de individuaj membroj kaj delegitoj; (c) publikigi almenaŭ trifoje jare altnivelan literaturan kaj kulturan revuon; (d) daŭrigi la eldonadon de fakvortaroj, sed pli atenti al la kvalito; (e) instigi eldonadon de antologioj de diversaj naciaj literaturoj en Esperanta traduko, aŭ mem eldoni tiajn antologiojn; (f) daŭrigi la serion "Oriento-Okcidento"; (g) eldonadi aliajn elstarajn tradukajn aŭ originalajn verkojn kaj morale apogadi ĉiujn eldonistojn, kiuj publikigas valorajn verkojn en la Internacia Lingvo.

11. **Specialaj kulturaj agadoj** : (a) Daŭrigi I.S.U. kaj, se iel eble, organizi almenaŭ de tempo al tempo memstarajn sesiojn ekster la U.K.; (b) daŭrigi kaj plibonigi la belartajn kaj oratorajn konkursojn; (c) instigi precipe la lokajn societojn utiligi pli vaste la magnetofonan servon; (d) vastigi la korespondan servon kaj ligi ĝin al aliaj organizaĵoj, kiuj prizorgas internacian korespondadon, tiel ke Esperanto fariĝu unu el la korespondaj lingvoj uzataj ankaŭ ekster la Esperanto-Movado; (e) nepre plibonigi la filman servon; (f) helpi la vastigon de la uzo de Esperanto en la radio; (g) instigi la utiligon de Esperanto por resumoj de libroj, studoj kaj artikoloj precipe kun scienca kaj faka karaktero; (h) kuraĝigi la uzon de Esperanto en komerco kaj trafiko; (i) organizi internaciajn prelegvojaĝojn de kompetentaj prelegantoj-esperantistoj; (j) utiligi ĉiujn eblecojn por vastigi la uzon de Esperanto en la medioj de scienco, edukado kaj kulturo.

B. Landaj Asocioj, Lokaj Societoj, Fakaj Organizaĵoj

12. **Landaj Asocioj** : Konforme al tiu-ĉi Baza Laborplano, prenante en konsideron la landajn cirkonstancojn kaj eblecojn, ĉiu Landa Asocio ellaboru propran programon kun aparta konsidero de jenaj taskoj : (a) organize plifortigi la Landan Asocion, altirante al ĝi la multnombrajn malnovajn esperantistojn kaj membrigante

novajn (tiucele informi ilin interalie ankaŭ pri la Baza Laborplano de U.E.A. kaj de la koncerna L.A.); (b) aliĝi senprokraste al U.E.A., se la koncerna L.A. ankoraŭ ne estas aliĝinta asocio; (c) en kunlaboro kun la Ĉefdelegito, se tia ekzistas, varbi kiel eble plej multajn individuajn membrojn de U.E.A.; (d) instigi la individuajn membrojn de U.E.A. fariĝi Delegitoj, Vicdelegitoj kaj Fakdelegitoj, precipe por la plej gravaj fakoj rilatantaj al scienco, edukado kaj kulturo; (e) organizi aŭ helpi organizon de L.A. en najbaraj landoj, en kiuj ankoraŭ ne ekzistas L.A.; (f) formi junularajn sekciojn kaj altiri la plej kapablajn gejunulojn en la gvidajn organojn de la L.A.; (g) helpi la ekzistantajn lokajn grupojn kaj fondi novajn; (h) formi Informan Fakon, se tia ankoraŭ ne ekzistas, laŭ la Principaro de Frostavallen kun aparta atento al disvastigo de la Internacia Lingvo en la universitatoj, lernejoj kaj ĝenerale inter la junularo; (i) organizi tutlandajn korespondajn kursojn, radio-kursojn kaj kursojn en nacilingvaj gazetoj; (j) uzi ĉiam la Internacian Lingvon ne nur en kongresoj, konferencoj, kunsidoj kaj kunvenoj, sed ankaŭ ekster la oficialaj aranĝoj inter esperantistoj; (k) enhave plibonigi la landan organon kaj publikigi ĝin nur en la Internacia Lingvo (por agado inter neesperantistoj oni eventuale eldonu specialan nacilingvan bultenon); (l) helpi ĉiurilate la centrajn organojn de U.E.A. en la realigo de la Baza Laborplano.

13. **Lokaj Societoj** : Konforme al tiu-ĉi Baza Laborplano kaj la Laborplano de la L.A., se ĝi ekzistas, ĉiu Loka Societo ellaboru propran laborplanon kun aparta konsidero de jenaj taskoj : (a) organiza plifortigo de la societo, speciala kampanjo por membrigi malnovajn esperantistojn, kiuj troviĝas ekster la societo, aligi novajn; (b) se iel eble havigi propran ejon kaj, en ĉiu okazo, propran bibliotekon, aboni la landan organon, la revuon "Esperanto" kaj kelkajn aliajn internaciajn revuojn; (c) organizi junularan sekcion aŭ apartan junularan grupon; (d) formi landan asocion, se ĝi ankoraŭ ne ekzistas; (e) aligi ĉiujn siajn membrojn al la L.A. kaj varbi kiel eble plej multajn individuajn membrojn por U.E.A.; (f) prizorgi, ke en la loko de la societo kaj en la apudaj lokoj estu D de U.E.A., eventuale VD kaj kiel eble plej multaj FD precipe por la plej gravaj fakoj de scienco, edukado kaj kulturo; (g) organizi aŭ helpi la organizon de Loka Societo en la apudaj lokoj; (h) organizi Informan Fakon laŭ la Principaro de Frostavallen kaj aparte atenti la agadon en lernejoj kaj ĝenerale inter la junularo (en universitataj urboj nepre vastigi la informadon en la universitato); (i) organizi konstantajn kursojn por komencantoj (intensa reklamado antaŭ la kursoj) kaj progresintoj; (j) membrigi la kursfinintojn al la L.S., L.A. kaj U.E.A.; (k) en pli grandaj urboj formi aŭ sekciojn aŭ novajn societojn (la spertoj montras, ke la granda plimulto de la L.S. atingas 60—80 membroj, malofte ĝis 300, kio necesigas la fondon, en tiuj urboj, de novaj sekcioj aŭ societoj ĉu laŭ teritoria kriterio — urba kvartalo — ĉu laŭ profesia aŭ faka : junularo, studentoj, laboristoj, intelektuloj aŭ similaj grupoj; (l) okazigi regulajn ĉiusemajnajn kunvenojn kaj konsiderinde plibonigi la programojn (prelegoj de la membroj, interŝanĝo de prelegoj kun eksterlandaj grupoj utiligante tiucele ankaŭ la Magnetofonan kaj Filman Servojn de U.E.A., literaturaj vesperoj; programoj konforme al la kunlaborado de U.E.A. kun Unesko, precipe rilate al la projekto Oriento-Okcidento; amatora teatra trupeto kaj kanthoro, vivaj gazetoj, lumbildaj prezentadoj, partopreno en la organizo de prelegvojaĝoj, dancvesperoj, amuzoj kaj aliaj distraĵoj, konstanta lingva kritiko kun la celo daŭre altigadi la lingvan nivelon); (m) senescepta kaj senkompromisa uzado nur de la Internacia Lingvo por ĉiuj aranĝoj de la L.S., inkluzive la komitatajn kunsidojn; (n) helpi al la organoj de la L.A. kaj de U.E.A. realigi la Bazan Laborplanon kaj la Planon de la L.A.

14. **Fakaj Organizaĵoj** : Konforme al la Baza Laborplano ĉiu faka kaj specialigita organizaĵo ellaboru

sian propran programon kun aparta konsidero al jenaj taskoj: (a) organize plifortigi la koncernan F.O. (eventuale krei landajn sekciojn, se tiaj ankoraŭ ne ekzistas); (b) aliĝi al U.E.A. laŭ art. 14 de la Statuto, se la koncerna F.O. plenumas la kondiĉojn; (c) instigi la membrojn aliĝi al U.E.A. kiel individuaj membroj kaj fariĝi FD por siaj respektivaj fakoj; (d) organizi fakajn internaciajn renkontiĝojn ne nur dum la U.K. sed ankaŭ ekster ili; (e) eldoni presitan fakan revuon aŭ pligrandigi kaj plibonigi ekzistantan, aŭ publikigi almenaŭ multobligitan fakan bultenon; (f) daŭre evoluigadi la fakan terminaron kaj eldoni kiel eble plej kompletan kaj modernan fakan terminaron, eventuale en la kunlaboro kun la centraj organoj de U.E.A.; (g) doni helpon al la centraj organoj de U.E.A. en la realigo de tiuj punktoj en la Baza Laborplano, kiuj interesas la koncernan F.O.

IV. EKSTERAJ TASKOJ

A. U.E.A.

15. **UNESKO kaj U.N.:** Utiligi ĝis maksimumo la eblecojn de la ĵus akirita nova pozicio (kategorio B) en la konsultaj rilatoj kun UNESKO por efike kunlabori kun tiu Organizaĵo kaj U.N. en ĉiuj aferoj, kiuj interesas la Esperanto-Movadon kaj en kiuj ĝi povas doni realan helpon al la plenumo de diversaj agadoj de UNESKO kaj U.N., tute speciale en la Granda Projekto "Oriento-Okcidento"; en la projekto koncernanta la antaŭenigon inter la junularo de la idealoj de paco, reciproka respektado kaj interkompreniĝo de la popoloj; en la agado en Afriko; disvastigo de la celoj kaj idealoj de UNESKO kaj U.N.; eldonado de klerigaj materialoj de UNESKO en la Internacia Lingvo; aktiva partoprenado en la konferencoj de UNESKO kaj en diversaj kunvenoj, seminarioj kaj aliaj aranĝoj organizitaj de UNESKO kaj U.N.

16. **Eŭropaj Institucioj:** Intensigi la klopodojn ĉe ĉiuj eŭropaj organizaĵoj kaj institucioj por la solvo de la lingva problemo en Eŭropo, tute speciale agi ĉe la Eŭropa Konsilantaro kaj la Konsilantaro por Kultura Kunlaborado.

17. **Aliaj Regionaj Organizaĵoj:** Iniciati agadon, ĉiam kun la celo solvi la lingvan problemon, simile al la agado en Eŭropo, ankaŭ ĉe aliaj gravaj interŝtataj regionaj organizaĵoj, precipe la Ligo de Arabaj Ŝtatoj, la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj kaj similaj organizaĵoj en Azio kaj Afriko.

18. **Specialigitaj Organizaĵoj:** Daŭre kontaktadi ĉiujn registarajn specialigitajn organizaĵojn kaj atentigadi pri la solvo de la lingva problemo per la Internacia Lingvo (unu el la ĉefaj taskoj de CED).

19. **U.I.A.:** Konservi kaj plifirmigi la rilatojn kun la Unio de Internaciaj Asocioj, liveri al ĝi la necesajn dokumentojn kaj aliajn materialojn pri la Internacia Lingvo, aktive partoprenadi en diversaj laboroj de U.I.A.

20. **Aliaj NRO:** Konservi kaj intensigi la bonajn rilatojn kun ĉiuj neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO, precipe kun tiuj de kategorio A kaj B.

21. **Lernejoj:** (a) Daŭrigi kaj vastigi la kampanjon "Esperanto kiel Baza Lingvo"; (b) daŭrigi la klopodojn vastigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj; (c) paralele daŭrigi la kampanjon por subskribo de Interŝtata Konvencio pri laŭgrada paralela deviga enkonduko de Esperanto en difinitan nombron da lernejoj de la landoj, kiuj aliĝos al la Konvencio; (d) informadi la Sekretariaton de UNESKO pri la progresoj sur tiu-ĉi kampo en la senco de la Rezolucio de la 10-a de decembro 1954; (e) apogi la agadon "Graĵnoj en Vento", laŭ ebleco eldonadi apartan internacian gazeton por lernejoj 4-fojojn jare; (f) organizi aŭ helpi la organizon de konferencoj de instruistoj kaj gelernantoj, laŭ la ebleco sub la aŭspicioj de UNESKO. (Vidu ankaŭ la p-ton 7).

22. **Azio:** (a) Utiligi la U.K. en Tokio kaj la Olimpiajn Ludojn en 1964 en la sama urbo por vasta informado pri la Internacia Lingvo en ĉiuj landoj de Azio; (b) utiligi la ekzistantajn landajn asociojn kaj la novekreitajn kernojn en Hindujo kaj Nepalo por plua disvastigo de la lingvo en

ĉiuj aziaj landoj; (c) helpi la instruadon per subvencioj, almenaŭ plej modestaj, al instruistoj de Esperanto en tiuj landoj.

23. **Afriko:** Utiligi la "Karavanon de Amikeco", organizitan de Lic. Tibor Sekelj, por vasta informa laboro en ĉiuj landoj, kiujn vizitos la ekspedicio, per (a) prelegoj fare de la membroj de la ekspedicio; (b) distribuo de aparta broŝuro kaj diversaj flugfolioj; (c) artikoloj en gazetoj kaj revuoj; (d) en gravaj kazoj havigo de dokumentoj de CED; (e) helpo rilate sendon de kvalifikitaj instruistoj en interkonsento kun la registaroj de la respektivaj landoj, se por tio maturiĝos la kondiĉoj; (f) okazigo de U.K.

24. **Suda Ameriko:** (a) Fortikigi la jam ekzistantajn landajn asociojn kaj kun ilia helpo fondi novajn; (b) okazigi unu el la sekvantaj U.K. en grava centro de Suda Ameriko post kiam la lingvo estos sufiĉe disvastiĝinta sur tiu kontinento.

B. Landaj Asocioj, Lokaj Societoj, Fakaj Organizaĵoj

25. **Landaj Asocioj:** Antaŭvidi en la programo de ĉiu L.A. precipe jenajn taskojn: (a) reprezentiĝi en la Nacia UNESKO-Komisiono aŭ almenaŭ kunlabori kun ĝi; (b) kunlabori kun la landa asocio por U.N., se tia ekzistas; (c) partopreni en ĉiuj manifestacioj okaze de la Tago de U.N., Tago de la Homaj Rajtoj kaj similaj datrevenoj; (d) kunlabori kun la landaj sekcioj aŭ landaj organizaĵoj de internaciaj organizaĵoj, kun kiuj U.E.A. kunlaboras sur internacia nivelo; (e) realigi kiel eble plej efikan kunlaboradon kun landaj edukaj, sciencaj kaj ĝenerale kulturaj organizaĵoj kaj institucioj; (f) helpi al la mondaĵ kampanjoj de U.E.A. laŭ specialaj planoj por la unuopaj kampanjoj.

26. **Lokaj Grupoj:** Antaŭvidi en la plano eksteraĵajn agadojn, adekvatajn al tiuj de U.E.A. kaj la L.A. nur, kompreneble, en lokaj kadroj.

27. **Fakaj Organizaĵoj:** Antaŭvidi en la programo de ĉiu F.O. precipe jenajn taskojn: (a) aliĝi al la samfaka neesperantista organizaĵo (elekti la plej konvenan, se ekzistas pluraj) aŭ almenaŭ trovi plej taŭgajn formojn de kunlaborado kun tiaj organizaĵoj; (b) publikigi studojn kaj artikolojn en nacilingvaj fakaj periodaĵoj; (c) publikigi Esperantlingvajn artikolojn aŭ prizorgi Esperantlingvajn resumojn en nacilingvaj libroj kaj periodaĵoj; (d) enkonduki la Internacian Lingvon kiel oficialan pontolingvon aŭ unu el la oficialaj lingvoj en internaciajn fakajn konferencojn; (e) efike kunlabori kun la centraj organoj de U.E.A. sur la kampo de enkonduko de Esperanto en fakajn mediojn.

V. KONKLUDO

28. **Centrigo kaj Malcentrigo:** Tiu-ĉi Laborplano estas bazita sur la fundamenta principo centrigo ĝis maksimumo la klopodojn al difinitaj celoj kaj malcentrigo la agadon mem ĝis la plej vastaj bazoj de la organizita Esperanto-Movado. Ne nur la centraj organoj de U.E.A., sed ankaŭ ĉiuj organizaĵoj apartenantaj al ĝi kaj ĉiu unuopa membro devas scii kien oni iras kaj kiujn celojn oni deziras atingi. Sciante tion, ĉiu organo de la Asocio kaj de la unuopaj organizaĵoj, kiel ankaŭ ĉiu individua membro, povos doni efikan helpon en plena konscio, ke agante sur unu el la niveloj — internacia, landa, loka aŭ faka — li kontribuas al la ĝenerala progresigo de la Internacia Lingvo. Ĉiuj eroj de la programo estas same gravaj kaj dependas unu de la alia. Ankaŭ la laboro sur kiu ajn nivelo, en kiu ajn el la organoj aŭ organizaĵoj, estas egale grava. Nur sukcesa plenumo de ĉiuj eroj garantias la sukcesan realigon de la Laborprogramo kiel tia kaj rezulte la proksimiĝon al la fina celo aŭ eĉ ĝian atingon en la proksima estonteco. Krome, sed certe ne malpli signife, la plena realigo de la Laborprogramo kaŭzos en ĉiu okazo, ke la lingvo estos multe pli vaste uzata ĉie en la mondo kaj tial la scio de Esperanto donos pli grandan utilon al ĉiu unuopulo; kaj paralele altiĝos la socia valoro de la Internacia Lingvo.

Generala Sekretario

NEŬTRALECO

Dum longa tempo mi deziris verki pri ĉi tiu temo por la pli bona orientigo de la Esperantistoj. Ofte oni renkontas trafan ekzemplon de situacio kie neŭtraleco estas esenca kaj saĝe uzata; egale ofte oni trovas okazojn, en kiuj la principoj de neŭtraleco estas aŭ miskomprenataj aŭ malatentataj. Tamen neŭtraleco estas grava principo por la prospero de la Esperanta movado. U.E.A. havas siajn membrojn kaj delegitojn en ĉiuj landoj de la mondo sen limigo de raso, kredo, religio, aŭ politiko nur pro zorga atento al la principoj de neŭtraleco.

Tial mi volas apelacii al ĉiu Esperantisto, kaj precipe al ĉiuj oficistoj en grupoj, federacioj k.t.p., por ke ili rigore observu la principon de neŭtraleco. Foje mi partoprenis Zamenhofan feston en kiu oni kantis himnon al Kristo; la vunditajn sentojn de ĉeestantaj Judoj vi povas facile imagi. Kristana preĝo ĉe la komenco de festmanĝo estas por multaj Britoj normala afero, sed se tio okazas regule en federaciaj aŭ grupaj aranĝoj, oni ne miru se Judoj, Budhanoj, Mahometanoj, Spiritistoj kaj Humanistoj — de ĉiuj ekzistas multaj en ĉi tiu lando — grade senentuziasmiĝas.

Mi komencis per du religiaj ekzemploj, ĉar en Britujo oni ofte emas forgesi, ke la Kristanismo ne estas universala afero. Lastatempe mi denove havis okazojn konstati, ke en aliaj landoj oni ne konscias, ke frazetoj kiaj "proletinternaciismo" kaj "antaŭenigo de mondsociismo" estas neneŭtralaj. En la koncernaj landoj ili estas preskaŭ kliŝoj de ĝentila konversacio. Aliaj pekoj kontraŭ la neŭtraleco estas: kunligo de Esperantismo kun iu politika kredo, ekz. Federaciigo de Eŭropo, socikredito, dekreto kontraŭ la atombombo ktp.; alprenado de naciaj antaŭjuĝoj en Esperantujo; deziro limigi aŭ cenzuri la enhavon de libro, gazeto aŭ teatraĵo en akordo kun la propraj antaŭjuĝoj.

Kompreneble ĉio ĉi ne postulas, ke la individua Esperantisto ne havu siajn kredojn, ne batalu por ili, ne uzu Esperanton por ili. Male estas dezirinde, ke oni tion faru. Plue estas dezirinde, ke kiuj havas fakan aŭ neneŭtralan kredon aŭ movadon, formu apartajn organizaĵojn, kaj pere de Esperanto klopodu antaŭenigi siajn kredojn inter kaj ekster la Esperantistoj. Por bona ekzemplo vidu kiel Zamenhof laboris pri la homaranismo, aŭ la funkciado de la Kristanaj diservoj en Londono, kiuj, sendepende de la Londona Klubo, regule kaj bone funkcias kun multaj subtenantoj inter la anoj de la Londona Klubo, sed havas nenian oficialan rilat-

ton kun ĝi. Tial laboru por via fako aŭ kredo, kiel individuo aŭ kiel aparta organizaĵo. Sed eĉ se centprocento de la membroj de loka grupo favoras la antaŭenigon de popoldancoj kaj la malpermeson de fumado, en via regiono estas amaso da eblaj rekrutoj al Esperanto, kies kredoj ne similas inter si, en ne-Esperantistaj aferoj.

Neŭtraleco, tamen ne estas iu seka negativeco, kiel ŝajne supozas iu Esperantista ĵurnalisto al kiu mi lastatempe parolis. Kontraŭe, ĝi postulas fortan intelektan laboron kaj havas du gravajn pozitivajn elementojn: (a) la sintenon rilate Esperanton kaj ĝiajn bazajn konceptojn; (b) la problemon de tolema kaj komprenemo.

Rilate al Esperanto mem oni ne povas esti neŭtrala kaj la vorton "neŭtraleco" oni nepre ne interpretu tiusence. Do ne akceptu mokojn aŭ rikaĵojn sen digna rebato. Ne allasu al iu ajn malsukcesinta aŭ novbakita projekto egalecon kun Esperanto, kiu estas vivanta kaj sukcesa lingvo. Pri ĉiu aŭ ĉio, kiu malpermesas aŭ malhelpas la uzadon de Esperanto aŭ internacian kontaktigon aŭ glatan funkciadon de la movado ni rajtas protesti, sen forigo de nia neŭtraleco kaj en defendo de la Esperantismo mem. Simile forte oni devas sinteni rilate al la lingvo kaj ĝia strukturo; ekzistas homoj, kiuj eldonas aŭ praktikas iun "modernan" aŭ "modifitan" aŭ "simpligitan" Esperanton. Ili ne estas niaj amikoj, sed perfiduloj, kiuj povas doni la impreson, ke Esperanto ne estas firma lingvo kun difina bazo kaj solida literaturo, sed projekto konstante ŝanĝiganta. Eĉ pli danĝeraj estas la subtilaj atakoj kontraŭ la fundamento de interne, la prezento de "pli logika" uzado de la participoj ol la zamenhofa. Pri tiaj aferoj ni ne estu neŭtralaj.

Alia baza koncepto de la Esperantismo estas la tiel nomata "interna ideo", termino mistika, kiu malplaĉas al pluraj samideanoj. Se tamen oni parolas pri la "fundamentaj motivoj" por la Esperantismo, mi kredas, ke oni esprimas la saman signifon sen la mistikismo. Kiaj estas tiuj fundamentaj motivoj? Miaopinie ilin bone esprimas la statuto de U.E.A. en la dua celo de la Asocio: "plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo". Tio estas vere bona gvidilo por ĉiuj niaj agoj. Tiu "faciligo" enhavas tri elementojn: — (i) la provizon de taŭga simpla interkomprenilo, la Internacia Lingvo mem; (ii) la starigon de forumo por libera interŝanĝo de ideoj, libera renkontigo inter kulturoj sur egala bazo;

kontaktiĝo inter la plej diversaj rasoj, kredoj, politikoj. Tian forumon provizas la neŭtrala Esperanto-movado kaj ĝiaj diversaj aktivecoj; (iii) la kreadon de toleremo kaj komprenemo.

Ĉi tiu lasta estas la tasko de ni ĉiuj, la tasko de Esperantistoj kaj aparte la tasko de la neŭtralaj organizaĵoj. Ĝi enhavas plurajn flankojn. Unue, oni devas zorge eviti kiun ajn kunligon de tiu aŭ alia religia aŭ politika kredo kun la neŭtralaj organizaĵoj. Due, oni devas zorge eviti la trudon de siaj ideoj per iu ajn rimedo alia ol simpla argumentado. Trie, oni devas permesi, kuraĝigi kaj helpi ĉiujn neneŭtralajn personojn aŭ movadojn uzi Esperanton por la propraj celoj. Kvare, en niaj grupoj, kunvenoj, kongresoj, seminarioj kaj aliaj aranĝoj ni devas allasi la esprimon de ĉiuj opinioj kaj tute liberan diskuton. Tiu esprimo de opinio povas esti en prelego, libro, artikolo, letero,

konversacio aŭ teatraĵo kondiĉe, ke ĉiuj komprenu, ke temas ne pri oficiala subteno sed pri la allaso de libera eldiro de opinioj. Kvine, ni devus ĉiuj peni per sinklerigo, per pensado, per la uzado de la rimedoj haveblaj tra la Esperanto-movado, akiri pli vastan komprenon de opinioj kaj kredoj malsamaj al la propraj.

Neŭtraleco, do, havas du flankojn. Negative, la eviton de iu ajn impresoj, ke la oficiala movado kunligiĝas kun iu ajn kredo; pozitive, la antaŭenigon de Esperanto kaj ĝiaj fundamentaj kredoj pri komprenemo, toleremo kaj proksimigo de la popoloj. Tiel komprenate, la neŭtraleco estas grava kaj serioza principo, kiu vere indas nian subtenon, nian bataladon, kaj nian konstantan atenton, por ke ĝi estu konservata kaj disvastigata.

N. R. Smith

(Represita el "The British Esperantist")



La 21an de novembro okazis la 6a kultura vespero dediĉita de la esperanto-grupo de ANGERS (FRANCUJO) al la orientaj popoloj (en konformiteco kun la ĉefprojekto de UNESKO pri la reciproka aprezo de la kulturaj valoroj inter Oriento kaj Okcidento). Tiufoje, Hindujo estis la temo de la vespero. Dank'al la klopodoj de S-ino HAUDEBINE, kiu nune instruas esperanton en tiu lando, la Hinda Konsilantaro por kulturaj rilatoj sendis por ekspozicio, riĉajn kaj belegajn artajn albumojn kies parto de la gravuraĵoj estis lerte aranĝita de esperantistino de ANGERS. S-ino POTIN, por prezentado dum la vespero. Plie, S-ino HAUDEBINE mem pruntedonis propran materialon kaj la Hinda Turisma Servo en Parizo sendis filmojn kaj donis afiŝojn kaj fotojn. La varia programo de tiuj vesperoj interesas la grupanojn kaj taŭge demonstracias la seriozecon de la movado por internacia lingvo (cetere, la Esperanto-grupo de ANGERS aliĝas al la franca federacio de la UNESKO-kluboj). Aliaj vesperoj nun prepariĝas pri Japanujo kaj Armenio. Oni vidas sur la foto, S-ino POTIN kaj S-ro A. FRANGEUL, Sekretario de la grupo, kiuj admiras parton de la materialo.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1962

Stato je la 31-a de januaro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Svislando	2103	1430	68,—
2.	Nederlando	4942	3280	66,37
3.	Usono	3610	2350	65,10
4.	Finnlando	2525	1605	63,56
5.	Danlando	2876	1768	61,47
6.	Francujo	6754	3992	59,11
7.	Svedujo	6190	3245	52,42
8.	Britujo	6661	3241	48,66
9.	Germanujo	7085	2780	39,24
10.	Hispanujo	2557	985	38,52
11.	Brazilo	4142	1575	38,03
12.	Norvegujo	1677	570	33,99
13.	Italujo	4253	1290	30,33
14.	Japanujo	3265	885	27,11
15.	Belgujo	2006	525	26,17
16.	Jugoslavio	5560	805	14,48

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Portugalujo	515	365	70,87
2.	Israelo	285	180	63,16
3.	Kanado	746	435	58,31
4.	Aŭstrujo	1440	755	52,43
5.	Aŭstralio	1148	568	49,48
6.	Madagaskaro	250	95	38,—
7.	Sudafriko	250	80	32,—
8.	Nov-Zelando	1184	320	27,03
9.	Argentino	505	105	20,79
10.	Islando	250	40	16,—
11.	Urugvajo	250	30	12,—

RICEVITAJ LIBROJ

Olsson, Ernst : KREDO, FLOROJ KAJ DINAMITO. Eld. Eldona Societo Esperanto, Malmö, 1961. 80p. 18.4 × 12 cm. Prezo : bind. 8,50 sv. kr. (22.4 steloj); broŝ. 4,75 sv. kr. (12.5 steloj).

LA EVOLUO DE LA ESPERANTA POEZIO

de

MAG. WILLIAM AULD

Eble la plej malnova ŝerco en nia movado koncernas tiun esperantiston, kiu, renkontiĝinte kun konato kaj sciiginte, ke li komencis lerni Esperanton, diris al li: "Do vi lernas Esperanton jam dum unu semajno? — Bonvolu do montri al mi la poemojn, kiujn vi verkis!" Kiel multaj satirecaj ŝercoj, ankaŭ tiu spritaĵo baziĝas sur perceptebla fenomeno. Ne malmultaj estas la komencantoj en nia lingvo, kies fruaj provoj sin esprimi per la nova por ili komunikilo alprenis versan formon! Ni rimarkas la saman fenomenon ĉe D-ro Zamenhof mem, kio donas al tiu moro sankciecon kaj pravigon, kaj mi mem tre certe ne volas primoki ĝin — tiom pli, ĉar ankaŭ mi estis ĝuste tia komencanto. Sed la fenomeno estas rimarkinda, kaj eble instrua. Mi ne volas ĉi tie provi analizon de la versemo de multaj esperantistoj; sufiĉas diri, ke certagrade estas pli facile verki verse ol proze — notu bone, ke mi diris "verse" kaj ne "poezie", kio estas alia afero — pli facile, ĉar la sintakso de versoj estas ĝenerale pli simpla kaj senkomplika ol la sintakso de prozo; t.e. kun simplaj propozicioj oni ricevas pli grandajn efikojn verse ol proze, ĉar en prozo la senkomplika propozicia strukturo efikas iom naivece. Ekzemple, jen poemo de Baranyai: "Tago el mia vivo" —

*Dum nokto: miloj da kandeloj,
Sopiraj sonĝoj... steloj... steloj...*

*Matene: kuro post Fortuno,
Esperoj novaj — nova suno.*

*Kaj tage: ŝvito... vana ago;
Trompiĝoj novaj — nova tago.*

*Jen mortis nova vivespero.
Mi sidas stulte en vespero.*

Sendube tio estas versaĵo; sendube ĝi estas ankaŭ poezio. Per 35 vortoj ĝi donas kompletan bildon pri la rutina tedeco kaj malesperiga malfacileco de unu tipe homa situacio. Kaj tamen *sintakse* la strukturo de la poemo estas plej simpla. Ĝi konsistas el simplaj frazoj kaj sugestiaj vortoj; ĝi enhavas 16 substantivojn, 7 adjektivojn — aŭ, pli precize, 3 adjektivojn, el kiuj unu estas eĉ ripete uzita 5-foje — 3 adverbojn, nur 2 verbojn, kaj eĉ ne unu akuzativon! En tia kadro, apenaŭ ekzistas ebleco fari gramatikajn erarojn, kaj ne mirinde, ke nia komencanto logiĝas al tia ŝajne facila ekzercilo — precipe ĉar, por atingi similan rezulton

en prozo, oni devus verki sufiĉe longan traktaton, kiu prezentus cent eblecojn de eraroj kaj tros-treĉus la embrian lingvokonon de la kompatinda novico!

Tiu ĉi fenomeno atentigas nin pri la vere ĉefa diferenco inter la prozo kaj poezio: ĝi estas diferenco *lingva*. La dua diferenco, kiun ni pritraktos poste, estas — ne la rimoj, kio estas tute hazarda kaj libervola dekoracio kaj ornamaĵo — sed la ritmo. Dume, tamen, ni iom esploru la apartecon de la poezia lingvaĵo. Ni jam aludis al la ĝenerale pli simpla *sintakso*, aŭ frazkonstruo, de la poezio. Ĝi parte klarigas la versemon ne nur de la hodiaŭaj komencantoj, sed ankaŭ de la fruaj esperantistoj, kiuj estis iasence lernantoj *pro* la komenca stadio de la lingvo mem. Sur la kampo de la *originala* literaturo — ĉar ĉi tie ne temas pri la tradukaĵoj, kie la situacio estas iasence inversa — la poezio ekfloris multe pli frue ol la prozo. Sed tiu fakto ne ŝuldiĝas *nur* al la relativa sintaksa simpleco de la versoj, kompreneble; kontribuis ankaŭ la fakto, ke la poezia lingvaĵo tendencas esti pli esprimiva kaj eksperimenta ol la lingvaĵo proza. Efektive, kiam la proza lingvaĵo fariĝas pli ol normale esprimiva aŭ eksperimenta, ni emas paroli pri "prozaj poemoj" aŭ "poemoj en prozo". Tiajn ni trovas, ekzemple, en la libreto "Elektitaj noveloj" de I.S. Turgenev, tradukitaj el la rusa de Alexandra Mexin kaj eldonitaj en 1923 de Ferdinand Hirt & Sohn, el kiu mi permesas al mi citi unu ekzemplon:

S F I N K S O

Flavete-griza sablo supre molaĉa, malsupre malmola... sablodezerto sen fino.... Super tiu ĉi sabla ebenaĵo, super tiu ĉi maro el morta cindro, sin levas grandega kapo de egipta sfinkso.

Kion volas elparoli tiuj ĉi dikaj, antaŭensaltintaj lipoj? tiuj ĉi senmove dislarĝigitaj, suprenfalditaj naztruoj — kiĉn ili esprimas? Kion volas diri tiuj okuloj, duone ekdormintaj, duone atentemaj sub duobla arko de altaj brovoj? Ili volas ion eldiri! Ili eĉ diras ion, sed nur Ojdipus povas solvi la enigmon, kompreni ilian senvortan paroladon.

Ho.... sed mi ekkonas tiujn ĉi trajtojn — en ili estas nenio egipta. Blanka, mallarĝa frunto, elsaltantaj vangostoj, mallonga, rekta nazo, bela blankdenta buŝo, molaj lipharoj, krispa barbeteto... sur la kapo — haramaso kun hardisiĝo.... larĝe disstarigitaj malgrandaj okuloj.... sed tio estas vi.... mia samlandano.... rusa kamparano? De kiam do vi iĝis sfinkso? Ĉu vi ankoraŭ ion volas elparoli? Jes, vi ankaŭ estas sfinkso.

Viaj okuloj — senkoloraj, sed profundaj — parolas

ankoraŭ. Ankaŭ sensona kaj enigma estas tiu parolado.

Sed kie — do sin trovas via Ojdipus?

Ho ve... ne estas facile fariĝi via Ojdipus, vi, tutrusa sfinkso!

Vi rimarkis, ĉu ne, la simpligitan sintakson kaj la altigitan esprimivon de la lingvaĵo? Pro tio Turgenev nomis tion: poemeto en prozo. La elstaraj trajtoj de la poezio estas esprimivo kaj simbologio. En "sfinkso" ni trovas tiujn trajtojn; nur la formo de la verketo ne estas poezia, kvankam ĝi proksimiĝas al tio. Eble kelkaj el vi jam pensas, ke multaj nuntempaj poemoj ankaŭ forme ne diferencigas de la prozo; nu, ankaŭ al tio ni revenos. Dume mi volas atentigi vin, ke la poezia lingvaĵo havas aliajn apartaĵojn. Jen strofo el poemo de Rossetti:

Peliĝi plu al ĉiam novaj bordoj...

Jen, ni balance buas,

jen, mergo nin detruas,

zefiras jen, nin ŝiras jen la nordoj.

Se tio estus verkita proze, estas dubinde, ĉu la aŭtoro skribus: "ni balance buas"; li verŝajne esprimus tion jene: "ni balanciĝas kiel buoj"; mi opinias, ke li ne skribus: "zefiras jen" — li skribus: "jen blovas zefiro"; kaj "nin ŝiras jen la nordoj" verŝajne fariĝus: "jen nordaj ventoj ŝiras nin". La pli densajn kaj dinamismajn formojn trudas — ne, kiel iuj maliculoj volis supozigi, la strikteco de la formo kaj la neceso trovi rimojn — sed la poezia bezono esprimi sin koncize-precize sugestie, ricevi la maksimuman efikon per la minimumaj rimedoj, t.e. vortoj, aŭ lingveroj. Se iu dubas pri tio, li komparu la strofon kun jena proza "traduko", kiun mi klopodis fari kiel eble plej juste...:

"Estas la homa sorto, ĉiam peliĝi kvazaŭ al novaj bordoj. Kelkfoje ni balanciĝas kiel buoj, kelkfoje ni estas merge detruitaj, kelkfoje blovas zefiro, kelkfoje la nordaj ventoj ŝiras nin."

Farante tiun tradukon, mi restis kiel eble plej fidela al la karakterizaj trajtoj de la proza stilo, kaj al la poezia intenco de la poeto; kaj sendube la poemo estas la pli potenca kaj pli trafa. Kaj al tiu potenco nepre kontribuas, kune kun la formo, la specialaj lingvaj formoj; krom tiuj jam menciitaj, ni notu ankaŭ la uzadon "jen... jen..." kie la prozo nature uzus "kelkfoje... kelkfoje..." Tio estas tipa poezia eltrovaĵo, kiu, kiel multaj, meritas eniri la prozan uzadon. Mi scias, cetere, ke la vortordo en la citita strofo ne estas la ordinara proza vortordo, kaj ke la malpli kutima vortordo unuavide povas ŝajni kontraŭdiro al mia pretendo pri la simpla sintakso de la poezio; sed rimarku, ke la frazkonstruo de la strofo restis tute simpla: la strofo konsistas el kvin mallongaj frazoj, el kiuj ĉiu estas senpene komprenebla, kaj antaŭ ĉio mallonga. El tio devenas la simpleco, dum inversigo de subjekto kaj objekto prezentas neniun malfacilaĵon al sperta esperantisto — ĉar oni neniam forgesas emfazi, ĉu ne, ke la vortordo de nia lingvo estas... "libera".

Sed ni turnu nin nun al la demando, ĉu la poe-

moj de iuj nuntempaj poetoj neniel distingiĝas de prozaĵoj. Mi volas unue citi el tre ĉarma poemo — mi citos nur mallongan parton el la komenco, kvankam la poemo meritas kompletan deklamacion — tre ĉarma poemo de nia ŝatata esploristo Tibor Sekelj; tiu ĉi poemo aperas en la nova antologieto "Reeĥoj":

Mi ne estas globtrotero, kiu manĝegas distancojn por fanfaroni pri ili.

Nek vojaĝisto senhejma, vaganta tra fremdaj landoj, pri la sia sopiranta.

Nek turisto senzorga pri vojiro antaŭvidita en gvidlibroj, nek pilgrimanto, kiu surgenue venas al sanktejo por plenumi promeson.

Bienulo mi estas trairanta sian bienon inter la sep maroj dissemitan.

Kaj kiel bona mastro, mi ŝatas la plej kaŝitajn terpecojn de mia farmo, samkiel la riĉegajn urbojn plenajn je vibranta lum'.

Ĉiuj vojoj de la mondo al mi apartenas.

Ne gravas ĉu temas pri nuboj, per kies flugiloj mi rajdadas,

aŭ pri maraj ondoj, kiuj disiĝas antaŭ la pruo de mia goleto,

aŭ pri reloj perdiĝantaj je l' horizont' senfina,

aŭ pri praarbaro, kiu malfermiĝas antaŭ la klingo de mia tranĉilego.

Ĉiuj vojoj ekestis kun la kaŝita espero,

ke iun tagon miaj plandoj en ili siajn spurojn postlasos.

Kaj vere mi trairos ilin, frue aŭ malfrue,

dum tiu ĉi inspekcia vojaĝo tra la mondo.

— sed jam la ĉarmo de tiu verko delogis min deklami pli, ol mi intencis! Ni lasu ĝin, kaj anstataŭe mi legu el alia verko de la sama aŭtoro:

"Ni turnu nin al la norda flanko de Kathmandu, kie je dek tri kilometroj de la urbo, ĉe la piedo de la unuaj montoj, troviĝas Budha-Nilkanta, alispeca sanktejo. Ĉirkaŭita de loĝejoj por pilgrimantoj, meze de kvarangula baseno, kuŝas la belega statuo de Narajan, aŭ Viŝnuo. Ĉirkaŭ sep metrojn longa estas la figuro de la dio, arte ĉizita el malhelgriza ŝtono, kuŝanta sur plektaĵo el serpentoj, kiuj apenaŭ elstaras el la akvo. Malantaŭ lia kapo etendiĝas krono el kapoj de serpentoj. Viŝnuo ĝis nun havis naŭ enkarniĝojn. La naŭa estis la Budho, laŭ la hindua kredo. Nun ni vivas en la erao de tiu naŭa enkarniĝo..." k.t.p.

Tiu citaĵo el la libro "Nepalo malfermas la pordon" estas interesa kaj pitoreska, sed ĝi estas tiel same evidente proza, kiel la unua citaĵo, malgraŭ la manko de batanta ritmo kaj regula formo, ne estas proza, sed poezia — pro kaŭzoj, kiujn ni tuŝis (sed nur tuŝis) pli frue. Utilas ripeti, ke poezio ne estas afero de rimoj kaj regule skandeblo ritmo, sed antaŭ ĉio ĝi estas afero de lingvo, en la plej vasta senco de tiu vorto. Mi devas ankoraŭ tambureti pri tiu punkto. Nia sudafrika poeto Edwin de Kock, en la poemo "Aŭtuna posttagmezo" el la libro "Ombroj de la kvara dimensio", skribas:

Foliolange

arboj flustras,

korosange

karno flustras

pri la aŭtuno.

Kalviĝas arboj

*antaŭvente.
Mi kalviĝas
mortosente,
malgraŭ la suno.
Atendi torturas
dum sablo de l' nuno
pretersusuras,
malgraŭ la suno.*

Jen kiel lingve distingiĝas tiu poemo: "Foliolange arboj flustras"; unue, rigardu tiun vorton "foliolange". La adverbo en Esperanto estas unu el ĝiaj plej elastigaj rimedoj; sed kiom ofte ni plene utiligas ĝian koncizecon en prozo? Al la poetoj ĝi estas tamen ĉiutaga pano, kaj ĉi tie de Kock utiligas ĝin eĉ kvarfoje, eĉ neniam kun precize sama nuanco: "foliolange", "korosange", "antaŭvente" kaj "mortosente". Krome, folioj *ne* estas langoj, kaj arboj efektive *ne* flustras, ĉar ili fizike ne kapablas flustri. Kio okazis do en la poemo, tio estas io tre konata: la poeto bildigas per personiga komparo; li komparas la arbojn al homoj, la susuradon kaŭzitan de ventblovado tra la folioj al la flustrado de homoj, kaj la foliojn de la arboj al la langoj de homoj. Tiu personigo vivigas la bildon, kiun li volas prezenti al ni. Pardonu, ke mi insistas pri io tiel normala kaj konata; sed tiu figurigo de la lingvaĵo estas fundamenta al la poezia procezo, kaj indikas alian distingon disde la prozo, kie oni uzas tiajn rimedojn multege pli ŝpareme. Denove, la poeto diras, ke "kalviĝas arboj". Tutsimple, arboj ne povas kalviĝi, ĉar "kalviĝi" signifas "senhariĝi", kaj arbo ne havas harojn. Sed ĝi havas branĉojn, kiujn la poeto komparas kun la haroj de homo, kaj tiel sugestie personigas denove la arbojn. Sed li plue skribas: "Mi kalviĝas mortosente..." Ĉu fakte li senhariĝas, perdas la harojn kiel la arboj perdas siajn foliojn en la aŭtuno? — evidente ne, laŭlitere; li kalviĝas, por tiel diri, interne, spirite: pro sento de morto forfalas liaj gloraj sentoj, kvazaŭ la haroj de sur homa kapo, kio siavice similas al la defalo de aŭtunaj folioj — ĉion ĉi sentigas la poeto per nuraj ses vortoj, sed zorge kaj precize elektitaj vortoj. Simile, kiam li skribas: "sablo de l' nuno pretersusuras", li memorigas nin pri sablohorloĝo kiu simbologas la pasadon de la tempo — kvankam tion li ne diras, sed nur sugestias.

Do ankaŭ per tia utiligo de la sugestie figuraj eblecoj de la lingvo la poeto laboras. Kiel la pentristo utiligas la farbojn, kiel la komponisto utiligas la sonojn sen signifoj de la muziko, kiel la skulptisto utiligas la ŝtonon, tiel la poeto utiligas la esprimeblecojn de la lingvo. Kaj kiel la pentristo luktas kontraŭ la fizikaj limoj de la farboj, tiel la poeto luktas kontraŭ la limoj semantikaj de la vortoj. Pro tio, ke tio, kion li volas diri, ofte kuŝas ekster la ĝisnunaj atingoj de la homa lingvo, li elserĉas ĉiujn rimedojn kaŝitajn en la lingvo kaj ofte ĝis tiam ne trovitajn, por doni komunik-eblan esprimon al sia konceptaro. Unu el la plej stultaj el la multegaj stultaj diraĵoj pri Esperanto, estis tiu, kiu asertis, ke la poezio ne eblas en

Esperanto, ĉar al Esperanto mankas longa tradicio kaj sekve nuanceco. La dirinto de tio verŝajne ne komprenis, ke ĉiu lingvo estas ilo por esprimo de la homa konceptaro, kaj estas tiel nuancita kiel estas la mensoj — la konsciaj mensoj — de ĝiaj uzantoj; tiom, nek pli nek malpli. Ĉiu lingvo estas samtempe limigita kaj senlime vastigebla. Unu tasko de la poetoj estas avangardi la vastiĝantan esprimivon de la lingvo.

Rezulte de tio, la poezia lingvaĵo estas ĉiam pli riĉa ol la proza lingvaĵo, kiu siavice estas pli riĉa ol la ĉiutaga, konversacia lingvaĵo. Tio validas por ĉiuj lingvoj, eĉ la primitivaj. Se oni komparas diversajn stadiojn en la evoluo de iu lingvo, oni konstatas, ne nur ke ĝi konstante ŝanĝiĝadas, sed ke ĝi ankaŭ pliriĉiĝadis. En certa stadio de la lingvo — nome, en la stadio de literatura floriĝo (kio okazis por la angla lingvo dum la 16a jarcento, por iuj aliaj okcidenteŭropaj lingvoj iom pli frue, por la plimultaj orienteŭropaj lingvoj pli malfrue) — la lingvo estis tute subite riĉigita per enfluego de novaj vortoj, aŭ, kiel ni ordinare nomas ilin, neologismoj. La vorto "neologismo" estas iasence speco de batal slogano por la esperantistoj, kiel ĝi siatempe estis ankaŭ en la aliaj lingvoj; ĉi tie mia intenco ne estas polemiki, sed konstati. Mi konstatas, ke la poezia lingvo, ĝuste pro tio, ke ĝiaj iloj estas la vortoj, bezonas pli riĉan vortprovizon ol la ĉiutaga prozo. Mi kompreneble ne povas konstati, ke tiu poezia lingvo poreterne restas apartaĵo de la poezio, kiel oni ankaŭ ne rajtas aserti, ke la poeziaj vortoj iel plikomplikigas la ĉiutagan lingvon. Neniel la afero estas tiel simpla. Sed en ĉiuj lingvoj, kiel ankaŭ en Esperanto, multaj vortoj restas aparte poeziaj kaj ne estas uzataj ekster ĝi; multaj vortoj elfalas el eĉ la poezia lingvaĵo kaj ne plu estas uzataj de la poetoj; kaj kelkaj, ĉar ili sentiĝas al la ordinara homoj kiel uzindaj, eniras la komunan, ĉiutagan lingvaĵon, kaj eble perdas sian t.n. "poeziecon". Tio estas la normala situacio en ĉiuj lingvoj. Ke la poezia lingvaĵo estas multe pli riĉa ol la komuna lingvaĵo devus esti tiel evidenta, ke ĝi ne bezonus klarigon; sed multaj homoj ial ne volas tion rekoni. La malfacileco de la ŝekspira verkaro eĉ por multaj angloj, ekzemple, fontas el ĝuste tiu ĉi fakto, ke la vortprovizo de tiuj homoj estas tro malabunda por sekvi komprene la konceptaron de la dramisto. Kaj en Esperanto ni facile konstatas, ke la poezia lingvaĵo estas ĝenerale pli riĉa ol estas la ĉiutaga lingvaĵo — ne nur pro la tiel-nomitaj "neologismoj", cetere, sed ankaŭ pro la pli vasta kaj konsekvenca uzado de la t.n. "oficiala" vortaro.

Nu, se tio povas konsoli iujn personojn inter ni, mi opinias, ke la granda epoko de la neologismoj — almenaŭ de la poeziaj neologismoj — en Esperanto jam forpasis. Ĝi cetere komenciĝis multe pli frue ol multaj esperantistoj konstatas. Ni ĵetu kelkan rigardon al la evoluo de la afero.

(Finota)

Novaj Libroj

Duope ricevatajn ni recenzas; unuope ricevatajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

H. A. de Hoog, D. B. Gregor, K. Kalocsay, S. La Colla, I. Lapenna, T. Nakamura (Teruo Mikami), T. Pumpr, J. Régulo, R. Schwartz, E. Sonnenfeld, G. Waringhien: *LA ZAMENHOFA ESPERANTO. SIMPOZIO PRI -ATA/-ITA.* — Kovrilo de John Hartley. — STAFETO: Movado, 2. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1961 — 22,5 × 15 cm. — 338 (VIII + 330) paĝoj. — Prezo: 11,40 gld. 45,60 steloj.

Nia universala heroo-eldonisto Régulo, en la urbeto La Laguna, en la insuleto Tenerife, estas vera *régulo* = reĝo de la Esperanta eldono. Kiel povas homo tiel multe legi, studi korespondi, decidi, decidigi kaj maldecidigi? Feliĉe ekzistas nun ne nur gigantoj-verkistoj kiel Auld, Baghy, Boulton, Kalocsay, Lapenna, Rossetti, Waringhien k.a., sed ankaŭ giganto-eldonisto, kiu ebligas ilian manifestiĝon.

Ĉiuj esperantistoj, kiuj ŝatas bone uzi la participojn en nia lingvo, vere ĝuos legante la precizigajn studojn, eseojn, de niaj eminentaj esperantologoj pri la Esperanta konjugacio, kaj miros ke Zamenhof tiel trafe solvis plej subtilajn problemojn de la lingvistiko.

La *Simpozio pri -ata/-ita* de Esperanto estas vera lumigilo pri nuancoj de la verba gramatiko. En Prologo de J. Régulo Pérez estas elstarigita la punkto de danĝero; en letero al Kalocsay, C. E. R. Bumy pritraktas la sencon de l'prezenco; Stefano La Colla, rimarkigas kelkajn notojn pri -ata-ita; en letero al Collinson, Kálmán Kalocsay klarigas la signifojn de plenumiĝo kaj plenumiteco; en letero al Jung, Ivo Lapenna evidencigas la logikan sistemon de participoj laŭ la Zamenhofa Fundamento; de Tomáš Pumpr estas Interludo kaj ĉu Esperanto sen aspektoj; japana opinio de Teruo Mikami pri la -ata-ita problemoj; de Raymond Schwartz: serioza studo "sen mistiko kontraŭ mistifiko"; de Gaston Waringhien: "kvazaŭ por fini..."; de D. B. Gregor: -ata-ita sen larmoj; de Juan Régulo Pérez: "Ni fosu nian sulkon", kaj de Ernesto Sonnenfeld: Ĉu "kompleksaj" verboformoj? Iel ankaŭ helpis por la pretigado de la libro S-roj. Bernard, Neergaard, Rossetti kaj Vatré.

Kelkaj el ni lernis la Esperantan

konjugacion laŭ tiu de sia hejma lingvo; do, sub ĝia influo. Tial kompreneble estas ke ni devas poste rimarki, ke ni iel trompiĝis, ke ni ne suĉis la pure zamenhofan konjugacion de la verboj en Esperanto. Post tia sperto kaj profunda restudo tra la verkaro de Zamenhof, Waringhien alvenis al la jenaj kvar konkludoj:

"1a La participaj sufiksoj, same kiel ĉiuj aliaj elementoj en Esperanto, obeas neniajn eksterajn "gramatikajn" regulojn; ne ekzistas pasiva konjugacio, sed serio da kunmetitaj formoj.

"2a Tiuj kunmetitaj formoj uzataj kun la verbo *esti* esprimas do simple, en kiu parto de la ago lokiĝas la stato montrata de tiu *esti*: aŭ dum la malvolviĝo mem de la ago (*esti -ata*), aŭ post la fino de tiu malvolviĝo (*esti -ita*).

"3a Rilate al tiuj du ebloj, ne ĉiuj verboj same rolas: la senco mem de iuj el ili ekskluzivas, ke oni perceptu ilian malvolviĝon aŭ oni konstati ilian finon per la estiĝo de ia rezulto.

"4a Sekve, la uzo de -at- aŭ -it- dependas ĉiufoje kaj de la esprimota nuanco kaj de la ĝusta senco de la verbo: la aro de la pasivaj formoj en Esperanto ne kongruas kun la pasivaj konjugacioj de niaj eŭrop-okcidentaj lingvoj, kaj ne estas eble fari tiajn interrespondajn tabelojn, kiajn oni trovas en la lernolibroj".

Kaj Pumpr trafe rimarkigas: "Oni povas riproĉi, ke la semantiko de la konjugaciaj finaĵoj kaj sekve ankaŭ ilia aplikado (la sintakso) dependas de la fakto, kian enhavon oni aljuĝas al la verbo, nome ĉu ĝi esprimas agon daŭran aŭ nedaŭran, rezulthavan aŭ senrezultan. Kaj tio povas en certaj limoj dependi ankaŭ de la subjektiva koncepto de la parolanto. Jes, estas tiel. Ni ne povas postuli, ke oni manipulu la esperantajn verbojn, neniel zorgante pri tio, kion ili esprimas; tio estus vanta spekulaciaĵo. Same ankaŭ tiu ne povas korekte manipuli la vortfaradon, kiu ne zorgas pri la enhavo de la radikoj kaj kiu volas sammaniere formi nomon de personoj el la adjektivoj 'nobla' kaj 'nobela', kvankam oni devas unuflanke diri 'noblulo' kaj aliflanke 'nobelo'; ankaŭ kiu volus el la verboj 'kombi' kaj 'marteli' sammaniere formi la nomojn de la instrumentoj, kvankam ni devas diri

unukaze 'kombilo' kaj alikaze 'martelo'. Tio estas la 'psikologia elemento' en la esperanta gramatiko. En tiu ĉi senco ni estas 'psikologiuloj'. Psikologiaj (metalogikaj) estas ĉiuj bazaj premisoj de iu ajn normo-sistemo. Nur la sistemo mem, kiu el tiuj premisoj estas elkonstruita, devas esti ekzakte logika, t.e. senkontraŭdira".

Tiu afero estas, efektive, pli grava ol simpla neologismo, kiu eble estos forgesita de la aŭtoro mem, eĉ se ĝi estos enirinta la Vortaron. Ĝi estos forgesita aŭ ĝi estos ne plu uzata —. Rimarku kiel, pro la malsama rolo de la verboj *forgesi* kaj *uzi*, mi devas diri *esti forgesita* aŭ *esti uzata*, por sama tempo —. La participoj, malsame al simpla neologismo, devas esti uzataj de ĉiuj esperantistoj, ili estas ĝeneralaj, apartenas al la strukturo de la lingvo.

Lastatempe aperis grava verko: *Introducción a la Gramática* de la kataluna lingvisto J. Roca Pons (Editorial Vergara, Barcelona, 1960), en kiu li traktas la aspektojn, kun mencio de liaj eminentaj kolegoj Gili Gaya, Hermann, Jakobson, Porzig, Van der Heyde, Holt, Alarcos, Guillaume, Meillet kaj Bassols. Laŭ ties klarigoj oni povas konstati, ke tiu verba gramatikajo ja estas tiel internacia, ke Esperanto ne povas eviti ĝin.

Malgraŭ do, ke en germana lingvo, verbo estas nomata *Zeitwort* = tempovorto, ekzistas ne nur tempideo sed ankaŭ semantiko de la verbaj finaĵoj. Aspekto (kaj aoristo) estas verba fenomeno, kaj oni ne povas tion ignori, eĉ se ĝi rilatas precipe tiun aŭ alian lingvon.

Nur genio povis sintezi tutan gramatikon je 16 reguloj. Sed lingvo ne konsistas el statikaj elementoj aŭ apartaĵoj. Lingvo respegulas pensadon, sentadon; lingvo estas, tial, fluado, kaj en ĝi estas ĉiaj interpunktoj, do: krizaj punktoj; kaj nur esceptaj artistoj kaj sciencistoj de la lingvo povas solvi, trafi aŭ krei la bezonatan esprimon por ĉiu punkto — senfinaj punktoj. Kaj dank' al la riĉa verkaro de Zamenhof kaj la plej grandaj Esperanto-verkistoj Esperanto fariĝis sufiĉa lingvo por havigi plenan gramatikon, por fari ĝian gramatikan analizon, kiel majstre faris Waringhien kaj Kalocsay.

Tiu *Simpozio* memorigas la kortuŝan fakton, ke la juna Zamenhof devis solvi kaj solvis tiom da lingvaj problemoj, pri ĉiu el kiuj spertaj, maturaj eminentuloj povas kontraŭstare debati tiel amplekse kaj profunde. Ja konsilinde estas ke ĉiuj esperantistoj, kiuj ŝatas lingvajn aferojn, legu la leterojn de Zamenhof kaj liajn lingvajn respondojn. Tiu *Simpozio* pravas, kiel necese estas, ke kelkaj refoje trastudu la Zamenhofan Esperanton.

Oni fine komprenu ke la plej simpla kaj facila lingvo estas la Zamen-

hofs; ke per ĝi povas interkompreniĝi eĉ tiuj, kiuj ĝin ĵus eklernis kaj povas nur fuŝe uzi ĝin; kaj ke samtempe nia lingvo estas universale riĉa kaj profunda, senfina! Senfina gramatike, vortare, semantike.

Akad. Delfi Dalmau

OMAGO AL GASTON WARINGHIEN. *Speciala kajero de "Esperantologio"*, red. D-ro Paul Neergaard. Kopenhago, 1961. 92p. 26.5 × 18.

La nestoro de la Esperanta filologio kaj leksikografio, prof. Waringhien, kiel konate pasis sian 60-an datrevenon en 1961. Omaĝe al li estas dediĉita la nova kajero de nia lingvistika revuo "Esperantologio" (vol. II, p. 73-168, ankaŭ eldonita en formo de speciala Waringhien-kajero), bona manifestacio pri la larĝa amplekso de nunaj esperantologiaj studoj: ĝi enhavas kontribuojn sur la kampoj de fonetiko, vortformado, leksikografio, sintakso kaj etimologio. Pluraj el la artikoloj rekte aludas al laboroj faritaj de la jubileulo. Enkondukas la kajeron omaĝaj vortoj de Kalocsay (verse), Neergaard kaj Privat.

Estas tute neeble en mallonga recenzo tuŝi pli ol supraĵe la amason de interesaj temoj, kiujn la kontribuantoj pritraktas. D-ro Albault, kiu jam antaŭe (en "Nuntempa Bulgario" 9/1959) prezentis hipotezon pri influo de la okcitana lingvo al la esperanta radikaro (*aglo, bramo, fali, naŭ*), nun pli detale eksplikas sian tezon. Tio, kio unuavide ŝajnis tre neprobabla, post la koincidoj trovitaj de la aŭtoro fariĝas konsiderinda ebleco. Speciale interesaj estas la koincidoj okc.-esp. en la formo de pra-Esperanto de 1881, kie eĉ Waringhien devis lasi multajn glosojn sen etimologio (vd. "Lingvo kaj Vivo", p. 46). D-ro Albault prezentas sian ideon kun ĉia prudento, kaj mi supozas ke ĝi devas esti diskutata kaj eble iom modifata, sed la fakto restas, ke li malfermis al esperantaj etimologoj novajn perspektivojn. Mia espero estas, ke tio instigos al pli intensaj esploroj rilate la efektivajn fontojn de nia lingvo. En sia artikolo d-ro Albault uzas lingvosimbolojn sisteme ellaboritajn de li mem. Estas interese kompari ilin kun tiuj rekomenditaj de ISO en majo 1960 (en ambaŭ sistemoj Eo = Esperanto — ĉu akceptenda?). — Etimologiajn problemojn pritraktas ankaŭ prof. Collinson ("Pri kelkaj kulturvortoj"). Aludante al la *civilizo kaj kulturo* de prof. Waringhien li esploras la etimologion de tiuj kaj kelkaj aliaj centraj vortoj (*scienco, arto, religio, virto*...). Paraleloj el periferiaj lingvoj kiel la kimra kaj la finna prilumas kaj reliefigas la latinajn etimologiojn.

W. Auld per statistiko montras, ke la procento de neologismoj (aŭ pli ĝuste neoficialaj vortoj) ĉe la poetoj

Hohlov (La tajdo, 1928) kaj Miĥalski (Prologo, 1929) estis nur 1, 2 resp. 0,9 el la tuta teksto. Tio pruvas ke ili sciis kolorigi kaj precizigi sian lingvon, uzante nur tre malgrandan kvanton da novvortoj. — Esperanto posedas tre valoran esprimilon en la preskaŭ nelimigita adverbigo. D. B. Gregor akcentas en sia studaĵo "La funkcio de la derivita adverbigo en Esperanto", ke derivado de adverboj, ĉu de verba, ĉu de substantiva, ĉu de adjektiva radiko procedis tute sendiskute, kvankam adverboj povas diferenĉi laŭ malsamaj funkcioj. La klarigo estas, ke la kunteksto ĉiam montras al kiu kategorio apartenas la adverbigo (maniero, loko, tempo, instrumento k.t.p.). La ekzemploj kolektitaj de Gregor (ĉefe el poezio) pruvas la mirindan elastecon de la esperanta adverbigo, kiu ofte havas rolon analogan al la ablativa aŭ instrumenta kazoj en fleksiaj lingvoj. — En la artikolo "Interplektitaj frazoj" de Hoog faras grandan breĉon en sintaksan kampon, kiun la plej multaj esperantaj gramatikistoj intence evitis. Temas pri la frazotipo "Kiu diras la homoj, ke mi estas?" (Mat. 16.13), logike analizebla en du diversaj manieroj. De Hoog registras la ekziston de tiutipaj kaj parencaj frazoj en la plej gravaj eŭropaj lingvoj kaj konkludas, ke ankaŭ Esperanto devas allasi kelkajn el ili (li do estas pli liberala ol Plena Gramatiko, § 366, rim. II). — Sintaksan terenon eniras ankaŭ V. Setälä ("Pri la artikolo, precipe en Esperanto"). Li proponas novan regulon por la uzado de la artikolo, bazante ĝin sur la kategoriigo de "determinaj" kaj "aludaj" esprimoj (A. Noreen, 1903). Ĝia kerno estas, ke la difinita artikolo estas uzenda kiam vorto estas uzata en aluda signifo. La nova regulo igus nenecesaj la esceptojn notitajn en Plena Gramatiko. Kiel konate, la uzado de la artikolo estas unu el la punktoj kontraŭ kiuj multegaj esperantistoj pekas.

Pli facila regulo senescepta povus havi sanigan influon al la lingvuzo. — Niaj eternaj problemoj estas tuŝataj en du kontribuoj. D-ro Kalocsay kondukas nin pli profunden en la labirintojn de la esperantaj aspektoj per sia studaĵo "La waringhiena verbodivido", kie li defendas la kategoriigon troveblan en "Lingvo kaj Vivo", p. 195 k.s. Prof. Régulo-Pérez verkis "Ĉu Nepalo aŭ Nepalujo?", respondo al la "Deklaro pri 'Nepalo'" de T. Sekelj (kiel oni rememoras, la aŭtoro kaj la eldoninto de "Nepalo malfermas la pordon" havas diversajn opiniojn pri la ĝusta esperanta nomo de la koncerna lando). Laŭ Régulo-Pérez, "Nepalo malfermas la pordon" tute paralelas al ekz. "Belgo malfermas la pordon". Ne estas tie ĉi la ĝusta loko por komenti tiujn du studojn, kies gravecon mi ne

volas kontesti. Aparta valorajo en la artikolo de Régulo-Pérez estas la tre klariga esploro pri la nocioj gento-lando-nacio-regno-ŝtato. — La plej grava interlingvistika kontribuajo de la kajero estas tiu de la redaktoro mem: "Demokrateco ĉe vortelektado kaj vortderivado en lingvo internacia". La artikolo komparas per paralelaj listoj kelkajn esperantovortojn en -isto kaj -a kaj iliajn ekvivalentojn en Occidental kaj Interlingua. Konklude la aŭtoro skizas la karakterizajn trajtojn de la naturismaj projektoj: (a) granda nombro de sinonimaj afiksoj, (b) manko de semantika stabileco ĉe la radikoj en vortderivado, (c) manko de libereco en vortderivado, (d) ekstrema ekspluatado de la latinida vortaro. La anoj de la naturismaj planlingvoj daŭre riproĉas al esperantistoj ke ni prisilentas iliajn projektojn (dum ili mem konstante serĉadas difektojn en Esperanto). Estas grava la konstato de d-ro Neergaard, ke la naturismaj kaj la regulecaj sistemoj baziĝas sur malsamaj principoj; oni ne povas kritiki Esperanton el la vidpunkto de kompleta natureco. Espereble la naturismanoj ne siavice prisilentu tiun ĉi artikolon! (En la menciitan liston englitis ĉagrena eraro pri la projektonomoj: la unua kolono devas havi la rubrikon *Interlingua*; *Interlingue* estas, kiel konate, la nova nomo de Occidental). — Ekster la limoj de la strikta esperantologio estas ankaŭ la artikolo de d-ro Manders: "Latino macaronico". Ĝi korektas kelkajn neĝustajn informojn en Drézen, "Historio de la mondlingvo": makaronika poezio ne estas, kiel deklaras Drézen, ia mondlingva projekto sed nura ŝerclingvo, kiu kombinas nacilingvaj radikoj kun latinaj finaĵoj. Ankaŭ esperanta makaroniko certe estas ebla, sed la specimeno citita de d-ro Manders apenaŭ meritas tiun nomon. — Du japanaj kontribuoj, sobraj kaj koncizaj, ornamas la kajeron. Kawasaki esploras pri "Konsonantkombinoj ĉe radikkomenco" (utiligante la materialon en "Grand Dictionnaire Esperanto-Français" de Waringhien); Ossaka determinis la gramatikan karakteron de la sufiksoj *in* kaj *um* (rezulto: *in* estas senkaraktera, ne substantiva; *um* estas nedifinita, ne senkaraktera). — Fine du artikoloj pritraktas transskribajn problemojn: tiu de J. C. Wells pri redono de angla prononco per esperantaj literoj kaj mia propra pri esperantigo de grekaj personaj nomoj.

Pro la granda diverseco de temoj tiu ĉi kajero de "Esperantologio" igas recenzan taskon neeble al unuopulo (eble kun escepto de prof. Waringhien mem). Sed jam tio estas grava kaj esperiga: nia lingvistiko havas larĝon kaj profundon. Mi supozas, ke la jubileulo kun granda kontento ricevis tiun ĉi omaĝon ("la plej bela donaco, kiun iu sciencisto povas doni al alia"),

konsciante ke li mem altgrade kontribuis al la evoluado de la priesperanta lingvoscienco.

Ebbe Vilborg

Noto: "Esperantologio" estas ekspektata ĉefe pere de la landaj perantoj, al kiuj ĉiu abononto sin turnu. Detala informo pri la eldonado de la revuo kaj ilustraĵo aperis (kun listo pri perantoj kaj abonprezoj) en "Esperanto", n-ro 7-8, 1961, p. 136.

Jean Forge: LA VERDA RAKETO. Eld. KOKO, Kopenhago, 1961. 147p. 21 x 13 cm. Prezo: 15 dan. kr. (30 steloj).*

Denove KOKO eldonas tre bone pro-

duktitan libron kiu donas plezuron al la posedanto (se oni esceptas la tro naivan desegnon sur la ekstero).

Jean Forge estas konata al ni kiel la aŭtoro de "Abismoj", "Salto trans jarmiloj" kaj "Mr. Tot aĉetas mil okulojn", sed dum jaroj li silentis. Nun li prezentas al ni "satiran novelaron el Esperantujo". Mi devas tuj konfesi, ke noveloj el Esperantujo ne plaĉas al mi: kutime mi trovas ilin sentimentalaj, tro verdaj (je ambaŭ signifoj!) kaj sukerecaj. Ankaŭ tiaj ecoj foje troviĝas ĉi tie, sed "La verda raketo" saviĝas per la benita vorto "satira" en la subtitolo. La satiremo de Forge estas amuza, kaj vinagras la trodolĉecon. Mi rimarkas la inter-

naciecon de la noveloj — oni ne povus diveni la naciecon de la pola aŭtoro.

En sia sprita antaŭparolo — pardonu al mi, mi devus diri: en sia privata letero al Jean Forge (ĉar neniuj legas antaŭparolon, sed ĉiu emas legi privatan leteron!) — Julio Baghy konstatas, ke la aŭtoro havas "plej karakterizan malfortecon: li verkas kompreneblaĵojn en respektata, komprenebla Esperanto". Kia bonvena malforteco! Kaj Baghy ja pravus, ĉar la stilo estas kaj klara kaj interesa.

Resume, ĉi tiu estas lingve bonega, leginda, sprita kaj ridiga libro kiun ĝuos tre multe da samideanoj.

W. J. Nesbitt

Ŝaka Rubriko

(Gvidas: D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio)

Ŝaka kunveno en Kopenhago

Tuj post apero de januara numero de nia revuo venis kelkaj leteroj kun informoj pri partopreno. Ĉar eventuala pligrandigo de la kunveno dependas de nombro de partoprenontoj, ni petas ĉiujn esp. ŝakistojn, kiuj partoprenos la 47an UK, ke ili tuj anoncu tion al gvidanto de nia rubriko. Se la cirkonstancoj tion permesos, ni povos okazigi aŭ matĉon kontraŭ unu ŝaka klubo en Kopenhago aŭ matĉon inter danaj kaj alilandaj esp. ŝakistoj. Skribu ankaŭ, se vi deziras partopreni event. rapidludan turniron.

Problema konkurso 1961

Finan rezultaton de la konkurso ni publikigos en maja aŭ junia numero. Sed jam nun ni povas diri, ke la intereso daŭre kreskas, ĝis fino de januaro partoprenis entute 74 gesamideanoj el 27 landoj. El ili minimume 20 jam atingis plenan nombron da poentoj.

Solvoj de problemoj:

problemo n-ro 12 (konk. problemo 3): Dc5—c8

problemo n-ro 13 (konk. problemo 4): Ra1—b1

problemo n-ro 14 (konk. problemo 5): Db7—a6

Nia partio

Hodiaŭ ni publikigas unu partion el interkluba peresperanta matĉo inter kluboj en Barcelona (Hispanujo) kaj Prässebo (Svedujo).

Bl.: Andrés Mitjavila (Hispanujo). Ni.: Kurt Carlsson (Svedujo).

1. d2-d4, Ĉg8-f6, 2. c2-c4, g7-g6, 3. Ĉbl-c3, Kf8-g7, 4. Ĉgl-f3, 0-0, 5. e2-e3 (pli bone estus e2-e4), d7-d6, 6. Kf1-e2, Ĉb8-d7, 7. 0-0, e7-e5, 8. e3-e4, Tf8-e8, 9. d4-d5, Ĉf6-h5, 10. Kcl-e3, Ĉh5-f4, 11. Dd1-d2, Ĉd7-c5 12. Ke3×c5, d6×c5, 13. Tf1-d1, Kg7-h6, 14. Dd2-c2, f7-f5, 15. Ke2-f1, Ĉf4-h5, 16. e4×f5, g6×f5 (Nigro minacis 16... f4 kun atako kontraŭ la reĝa pozicio de Blanko) 17. h2-h3, e5-e4, 18. Ĉf3-e1, Kc8-d7, 19. a2-a3, e4-e3, 20. f2-f3 (Se 20 f×e3, K×e3†, 21. Rh2, Ka4, 22. Ĉ×a4, Dd6†, 23. Rh1, Ĉg3†, 24. Rh2, ĉ×f1†, 25. Rh1, Dh2 mato — Se 21. Rh1, tiam Ka4, 22. Ĉ×a4, Ĉg3†, 23. Rh2, Dd6, 24. Ĉf3, Ĉ×f1†, 25. Rh1, Dh2†, 26. Ĉ×h2, Ĉg3 mato Dd8-h4, 21. Ĉel-d3, e3-e2, 22. Ĉc3×e2, Kh6-e3†, 23. Rg1-h2, f5-f4, 24. Dc2-c3, Kd7×h3, 25. g2×h3, Ke-f2, 26. Ĉd3×f2, Te8×e2, 27. Kf1-g2, Dh4×f2, 28. Td1-g1, Ta8-e8, 29. Ta1-f1, Df2-g3†, 30. Rh2-h1, Dg3-h4, 31. Tf1-d1, Te8-e3 (Se 31. Rh2, tiam Te8-e3, 32. Da5, Ĉf6, 33. D×c7, Ĉg4†, 34. Rh1, D×h3†, 35. K×h3, Th2 mato) 32. Td1-d3, Ĉh5-g3†, 33. Rh1-h2, Ĉg3-f1†, 34. Blanko resignis. Koment. T. L.

Filmo en Esperanto

ĜERMOJ DE LUMO

La malgranda rulfilmo, per kiu oni fotografas siajn plej bonajn libertempo-memoraĵojn, havas tre grandan popularacon. Sed kiamaniere estiĝas tiu rulfilmo? Tio estas klarigata en tiu ĉi filmo. La impresebla materialo (kolora kaj nigrablanka) estas la rezulto de grandioze farita scienca esplorado, perfekta produkto-aparato kaj eminenta kvalito-kontrolo. La fotografado cetere ne nur estas instigo al simpatia tempo-pasigo, sed ĝi havas en la tuta moderna vivo grandegan signifon. En la industrio, la medicino, la presarto, la scienca esplorado sur multe da terenoj kaj memkompreneble ankaŭ en la filmindustrio, ĝi ebligas netakseblajn servojn. Pri ĉio tio rakontas tiu kolorfilmo en serio de klarigaj bildoj, kiuj estas ofte de alta poeta kvalito kaj estas trafe substrekitaj de inspira muziko.

La kolorfilmo daŭras 25 min., estas optika en normal-filmo 35 m/m kaj ankaŭ en 16 m/m.

Oni povas pruntepeti ĝin senpage skribante al:


N.V. GEVAERT FOTO - PRODUKTEN

Dienst Publiciteit

Septestraat MORTSEL

Belgijo

Problemo n-ro 18 (konkurso 1962 — n-ro 2) J. Dobruský.



Mato en 3 movoj (pro ĝusta solvo 3 poentoj)

Kontrolo: Bl.: Rh4, Da6, Te4, Ka2, Ke5, Ĉf8

p.: c5, d6, f2 (9)

Ni.: Rf5, Kd5, Ĉb6, P.:b5, f3 f4 (6)

Solvojn sendu al gvidanto de Ŝaka rubriko, D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio ĝis 30.4.62.

TRADUKMAŜINOJ EN SOCIA PERSPEKTIVO *)

De temp' al tempo iu ĵurnalisto triumfe proklamas, ke la aŭtomata tradukado estas forigonta la konfuzon kaŭzatan de la kreskanta nombro de agnoskitaj kulturlingvoj, la konfuzon, kiu brem-sas progreson de scienco kaj tekniko. Iuj espero-plenaj profetoj salutas la progreson de elektroniko kiel komencon de nova epoko en historio de la kulturo. Ekzemple la eminenta franca scienculo Emile Delavenay, en sia "Enkonduko al maŝina tradukado" (angla eldono, Londono 1960 p. 114):

"Ne nur pro hazardo la sovetaj sciencistoj laboras pri kompilo de tradukprogramoj el la lingvoj araba, burma, ĉina, hinda, indonezia aŭ vietnama en la rusan. ¹⁾ Kaj la grava atento de sovetiaj lingvistoj pri aziaj lingvoj estas ne nur politika. Novaj sendependiĝintaj nacioj bezonas eblon legi verkojn alilandajn en siaj propraj lingvoj. Ili ŝatus ankaŭ, ke ilia propra literaturo estu tradukata en aliajn lingvojn. La aŭtomataj programoj por tradukado en la rusan lingvon reprezentas la unuan paŝon en la proceso de esplorado pri lingvistikaj rilatoj inter lingvoj, la proceso rezultiganta dudirektajn tradukprogramojn ²⁾..... Aŭtomataj tradukoj povas akceli kontaktojn de tiuj junaj nacioj kun aliaj popoloj, helpante al ili refirmigi siajn proprajn personecojn kaj konservi sian propran kulturan heredaĵon, riĉigante ĝin samtempe per kontakto kun aliaj kulturoj. Tio ŝajnas la sola ŝanco (antaŭ ol estos tro malfrue) pasi trans la interpopolaj baroj de lingvaj diferencoj, ne damaĝante tamen la originalecon kaj diversecon de la kulturoj. En la mondo, en kiu kosmopolitaj tendencoj ekregas pro rapideco de la interkomunikado kaj en kiu kelkaj lingvoj pro ekonomiaj kaj strategiaj kaŭzoj povus surmeti sian hegemonion al la mondo, plimultigo de aŭtomataj tradukoj estas unu el rimedoj defendi la naciajn kulturojn kontraŭ la tendenco al niveligo kaŭzata de la ĉiam pli samformiĝanta tekniko kaj per la monda disvastiĝo de la universala teknika terminologio".

Estas surprize, ke en ĉiuj ĉi asertoj la ekonomia faktoro ne estas eĉ menciita. Dume ja estas klare, ke la sociaj kaj politikaj aspektoj de la aŭtomata tradukado devas esti interpretataj en lingvo de financaj premisoj, samnivele kun ĉia invento celanta produktadon de iuj komerceblaj varoj.

La lasta ekspozicio de elektronikaj kalkulmaŝinoj en Londono evidentigis, ke eĉ la tute ne

perfekta maŝinoj, kapablaj fari nur krudajn tradukojn, kostas ĉ. 1 milionon da pundoj popece. La nova eksperimenta aparato de la Londona Universitato koston 2 milionojn da pundoj. Eĉ la plej esperoplenaj optimistoj taksas, ke en seria produktado pli-malpli uzebla tradukmaŝino ne povos kosti malpli ol 175.000 pundojn.

Certe, oni asertas, ke la kosto de maŝina tradukado sumiĝas je nur 3-5% de la homa. Plejparte tamen oni evitas la mencion, ke en la nuna stato tradukmaŝino povas adekvate pritrakti iun tekston nur, se ties temo estas tiel limigita aŭ tiel homogena, ke la respektiva lingva (terminologia) programo kun strikte limigita aspekto povas esti plene ampleksata de la maŝino (ekz. en kazo de tekstoj matematikaj, fizikaj, kemiaj ktp). Se ne, la tradukota teksto devas transiri specialan proceson de "antaŭredakto", t.e. de adapto de la teksto al la amplekso de la programo disponigita al la maŝino. Rezulte la farita traduko estas "postredaktenda", t.e. tradukenda el la idiomato de la maŝino en kutiman parolon. Kompreneble, por ke la definitiva traduko estu korekta kaj adekvata, la postredaktanto devas kompari la maŝinan tradukon kun la originala (ne antaŭredaktita!) teksto tradukita kaj korekti la tradukon laŭ ĝi. La homa faktoro do ne estas eliminata. La tradukmaŝino ne forigas la lingviston, nur faras parton de lia tasko. Kompreneble, la grandskala lingvista kaj inĝeniera eksperimentado kaj esploro estas promesoplenaj kaj certe venos la tempo, kiam malavantaĝoj de la aŭtomata tradukado estos grandparte eliminataj. Jam nun iuj maŝinoj (tre malmultaj) kapablas traduki iujn neidiomajn tekstojn en neidioman kutiman parolon; la postredakto limiĝas al precizigo de idiomaj kaj emociaj implicoj de la teksto. Ĉiu paŝo tamen en tiu direkto premisas teknikajn komplikojn kaj kreskon de bazaj investoj neproporcie grandajn kompare al la kresko de efikeco atingita aŭ atingebla.

La bezonata grandega investo signifas, ke nur ŝtato aŭ grandegaj entreprenoj kapablos havigi al si aŭtomatajn tradukilojn. Pro la alta amortizendo kaj tre altaj kostoj de operaciado la investo estas ekonomie pravigebla nur se la tradukmaŝino estas plentempe uzata, t.e. se la nombro de la mendoj rilate al la baza kaj operacia kostoj permesas profitigan prezon malpli grandan ol la kosto de la homa tradukado. Alivorte, ekonomio de la tradukmaŝino premisas komercan koncentrigon de la tradukado. Ĉi tiu fenomeno estas nenio nova. La samo okazis ja en materia varproduktado, en kiu individua metiekonomio trans primitiva koncentro de homa produktforto en manufakturoj pere de invento de maŝino atingis etapon de mekanika koncentrigo. Samaj estas ja ekonomiaj implicoj de la botfara maŝino, kiel de la tradukmaŝino. Nek nova estas la fakto, ke mekanika koncentrigo ampleksas la sferon de kulturvaloroj: tio okazis ja delonge, kiam presado faris libron kaj

*) *Anglalingva resumo de la supra artikolo unuafoje aperis en "The Worker Esperantist" (Britujo) n-ro 9 (139) 1961.*

¹⁾ *Programo" en la terminologio de elektronikaj maŝinoj estas la sistemo de "instrukcioj" (mekanikaj aranĝoj) kapabliganta la maŝinon solvi iun difinitan problemaron.*

²⁾ *Unudirekta tradukprogramo kapabligas la maŝinon traduki el lingvo A en lingvon B, sed ne inverse; la dudirekta permesas inversigi la procedon.*

poste periodan informadon amasprodukta varo. Certe, en kazo de libro aŭ gazeto la fina produkto estas materiaĵo. En niaj propraj tempoj la proceso de mekanikigo ekampleksis ankaŭ alian kultursferon, t.e. peradon de parol- aŭ bildinformoj kaj de foniaj aŭ plastikaj estetikaj valoroj (radio, televido). En kazo de telekomunika koncentrigo tamen temas esence pri fizika perado de sensaj formoj de la produktoj de la homa penso. La tradukmaŝino penetras en novan sferon: ĝi peras inter la samnivelaj formoj de la homa penso. Tiu proceso ĝis nun estis efektivebla pere de homa penso — "metie" (individue) aŭ "manufakture" (koopere en kadro de entrepreno). La nova fenomeno konsistas en tio, ke ankaŭ perado inter la samnivelaj formoj de la homa penso subiĝas al mekanika koncentrigo kaj per tio eniĝas en la regantan sistemon de la socia ekonomio.

Kiel ĉiu grava ekonomia evoluetapo, ankaŭ la tradukmaŝino havas sian politikan aspekton. En la nuna stato de nia multlingva mondo tradukado estas sendube unu el la ĉefaj vojoj por internacia trafiko de la ideoj kaj spertoj. Samkiel la medioj de amasinformatado (gazetaro, radio, televido), la internacia perilo de la penso ne povas esti indifera al la ŝtato. Precipe al ŝtato totalisma, kiu konsideras la sferon de internaciaj rilatoj sia monopollo aŭ al ŝtato imperiisma, kiu penas direkti la fluon de tiu internacia trafiko konforme al siaj interesoj. La alveno de tradukmaŝino rezultigos pluan koncentradon de internaciaj rilatoj fare de establitaj interesoj ekonomiaj kaj politikaj.

Tiu proceso apenaŭ estas evitebla. Koncentrigo de ekonomia povo pro mekanikigo kaj masa produktado — kiel ni diris — estas la esenca trajto de la socia sistemo, en kiu ni vivas. Tiu koncentrigo jam profunde influis kvante kaj kvalite la trafikon de ideoj kaj estetikaj valoroj per monopoligaj tendencoj ekonomiaj kaj politikaj en la evoluo de la medioj de amasinformatado. Nun venas la vico de la interlingva cirkulado de la homa parolo. Ni ne povos haltigi tiun koncentrigon kaj cetere estus senutile metadi barojn al la teknika evoluo sendube progresiga ekonomie kaj parte ankaŭ kulture. Ni povas tamen kaj devas kontraŭi ties monopoligajn tendencojn.

Al la domaĝigaj sociaj efikoj de ekonomia koncentrigo pro mekanikigo de la produktado kontraŭagis sociaj faktoroj: la ideoj kaj politike organizita konscio de tiuj socitavoloj, kiuj plej forte estas domaĝataj de tiu koncentrigo. Tiu dinamika konscio grandparte ekvilibrigas la efektojn de la monopoligaj tendencoj, celante al pli demokratia redistribuo de la produktokvanto. Same la libero kaj varieco de internacia trafiko de la homa penso povas kaj devas esti defendataj de socia movado. Por atingi tion sufiĉas fari la tradukon mem nenepre perilo interlingva, aŭ almenaŭ konsiderinde limigi ties amplekson. Kaj tiu elimino aŭ limigo

de la amplekso de la traduko premias Lingvon Internacian.

Unuvorte: Multlingveco plus tradukmaŝino rezultigas monopolismajn tendencojn en la internacia trafiko de la homa penso.

Dume: Lingvo Internacia, disponigante la transportilon de tiu trafiko al vastaj popolamasoj, provizas la homaron per efika armilo kontraŭ la monopoligaj kaj direktismaj tendencoj en la interlingva trafiko de la penso.

Post la supraj konsideroj ni revenu al la cititaj asertoj de la franca sciencisto.

Ĉu estas nur hazardo, ke la sovetiaj sciencistoj unuflanke kaj la usonaj kaj britaj duaflanke celas precipe al realigo de la dudirekta maŝina tradukeblo de la lingvoj rusa kaj angla, anstataŭ okupiĝi pri kulture multe pli necesa ellaboro de tradukaj maŝinprogramoj por malpli grandaj nacioj? Ĉu ne estas fakto, ke pro polarizo de la ekonomia kaj politika povo inter la du antagonismaj blokoj la tradukmaŝino laŭ politika vidpunkto estas konsiderata precipe kiel unu el la pluaj instrumentoj de la "malvarma milito"? Koncentro de politika povo kaj koncentro de teknikaj rimedoj por internacia trafiko de kulturo estas reciproke komplementaj. Lingvo Internacia per si mem ne povas kontraŭbalanci tiun tendencon, sed almenaŭ ĝi provizas nin per rimedo por kontraŭagadi ties efikojn.

Oni devas esti eksterordinare blinda je ekonomiaj kaj politikaj implicoj de la problemoj por esperi, ke la tradukmaŝino kontribuos al la kultura sindefendo de junaj etnacioj kontraŭ la lingva imperiismo de la grandnacioj. Estas ja tute klare, ke simple pro ekonomiaj kaŭzoj la enkonduko de la maŝintradukado estas plifortigonta la atakpablon de lingvaj imperiismoj, samtempe intensigante la reciprokan antagonismon de la konkurantaj lingvaj imperiismoj mem. Kaj refoje la sola ebla alternativo estas Lingvo Internacia, kiu metas ĉiujn lingvojn — la imperiajn kaj la nacioregionajn — sur la sama nivelo.

Kaj fine ni ne forgesu, ke la skriba parolo kaj ties traduko ne estas la sola transportilo de la internacia trafiko de la pensoj. Kiel prave diras la citita sciencisto mem, la kresko de la rapido kaj intenco de la transporto kaj komunikado implicas, ke neniam de post la komenco de la homaro la homo estis kaj ties penso estis tiel internacie movkapablaj. Certe, la rezultanta amaseco de internaciaj interhomaj kontaktoj estas pli potenciala ol aktuala kaj ne progresas sampaŝe kun la internacia trafiko, ĉar la lingvaj baroj staras inter la teknikaj kaj sociaj kontaktebloj. Ĉu la maŝino povos forigi tiujn barojn? La vizio de du potencialaj amikoj sidantaj ambaŭflanke de tradukmaŝino kaj pagantaj iun akcian kompanion por la duba privilegio gvidi skriban konversacion pere de la amika servo de la maŝino estas tro groteska

eĉ por la plej entuziasmaj profetoj de la elektroniko. La intensiĝantaj interhomaj rilatoj individuaj kaj kolektivaj en internacia skalo plue estas nemekanikigeblaj kaj restas en la sfero de sociaj solvebloj. Kaj la socia solveblo premisas Lingvon Internacian.

Kompreneble, Lingvo Internacia NE estas solvo per si mem: ĝi estas nur premiso de la solvo efektivebla nur de socia movado plene konscia pri sia celo.

D-ro Marek Waysblum

Donacoj por CED

	£	ŝ	p
La stato je la 30-a de oktobro 1961	51-	9-	0
S-ro J. Giessner, Germanujo	8-	1	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	4	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	4	
S-ro R. Slot, Nederlando	19-	10	
Svisa Esperanto-Societo, Svislando	4-	2-	4
S-ro E. F. Dean, Britujo	1-	0-	0
S-ro Marly, Francujo	1-	8-	0
Sveda Esperanto-Federacio, Svedlando	25-	0-	0
S-ro F. Ramolfo, Italujo	11-	8	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	4	
S-ro S. Sjöblom, Svedujo	2-	9-	8
S-ro W. O. Roelofs, Nederlando	18-	11	
S-ro Ferreira da Souza, Brazilo	5-	5	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	5	
S-ro Bouvier, Svislando	2-	1-	2
S-ro W. Baaten, Nederlando	6-	0	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	8-	4	
Friza Esperanto-Rondo, Nederlando	1-	14-	2
Stato je 31 decembro 1961	95-	4-	0

CED tutkore dankas al ĉiuj, kiuj subtenis finance ĝian laboron en la jaro 1961. Donacojn por CED akceptas la C.O. de U.E.A., ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj, aŭ rekte la Oficejo de CED je la nomo de ĝia Direktoro.

UNIKA JUBILEO

Antaŭ kelkaj semajnoj ni ricevis MS-kotizon de membro, kiu en la fino de la akompana letereto skribis: "Per tio ĉi mi pagas kotizon al UEA la kvindekan fojon, ĉar mi fariĝis membro en 1912".

Efektive, tiu persono kiu estas Sinjoro

BJÖRN P. BLÖNDAL

Hammstanga, Islando, delegito de U.E.A., seninterrompe estis membro-abonanto de U.E.A. dum 50 jaroj; post la lasta milito daŭre kiel MS. Pro tiu fakto estas gratulinda ne nur S-ro Blöndal, sed precipe ankaŭ U.E.A. Ĉiu membro estu konscia ke, se ĉiuj membroj, kiujn havis U.E.A. dum tiuj 50 jaroj, estus restintaj same fidelaj kaj integraj kiel S-ro Blöndal, la Asocio aspektus tute alie! La bedaŭrinda vero estas, ke ĉiujare centoj da membroj ne renovigas sian membrecon. La kaŭzoj estas diversaj: manko de enspezoj, malebleco transigi monon, sed ofte ankaŭ nur forgesemo, malatentemo, manko de intereso, personaj ofendetoj kaj kvereletoj, aŭ — kredo tion aŭ ne — eĉ iu ne respondita letero, kvazaŭ tio iel ŝanĝus la subtenindecon de la afero.

Kore mi deziras al S-ro Blöndal ke ankoraŭ longe li povus resti membro de la Asocio, al kiu li montris tiom da fideleco. Al ĉiuj hodiaŭaj individuaj membroj de U.E.A. ni direktas alvokon, de nun sekvi la brilan ekzemplon de S-ro Blöndal kaj seninterrompe resti membro de U.E.A. ĝis la fino de la vivo.

M. H. Vermaas,
Direktoro C.O.

ZAMENHOF-ALEO EN DORDRECHT

La 27-an de Januaro 1962 oni inaŭguris en la urbo Dordrecht (80.000 enloĝantoj; multaj ŝipkonstruejoj kaj fabrikoj) Zamenhof-aleon en ĉeesto de la urbestro, kvar skabenoj kaj pluraj membroj de la urbestro. La aleo, kiu kruciĝas kun la Baden Powell-aleo, situas en bela nova kvartalo. Tuj apude troviĝas liceo, gimnazio kaj kelkaj aliaj lernejoj. Malkovris la nombtabulon la filino de la delegito de U.E.A., S-ro C. Nelson, ĉefa aginto en la klopodoj kiuj rezultigis la decidon pri la nomigo. Krom S-ro Nelson parolis la urbestro de Dordrecht, reprezentantoj de la laboristaj kaj de la kristanaj esperantistoj kaj la direktorino de la C.O. de U.E.A. Krome ĉeestis la prezidanto de la Akademio, la vic-prezidantino de Universala Ligo, la sekretariino de la internacia katolika movado, la prezidanto de la landa asocio kaj multaj aliaj esperantistoj el Dordrecht kaj ĉirkaŭaj lokoj.

Tuj post la inaŭguro la tuta societo estis invitita al apuda restoracio, kie malgranda sed taŭga ekspozicio estis aranĝita. La ĉeestantaj aŭtoritatuloj kaj ĵurnalistoj ricevis informan materialon. La loka gazetaro donis tre bonajn raportojn pri la okazaĵo. La tuta arango estis ekzemplo de Zamenhof-strata inaŭguro sur digna nivelo.

M. H. V.



Aperis la unua kajero de esperanta eldono de la romkatolika revuo "Nova Civito". Agrable presita sur 16 grandformataj paĝoj, kun artikoloj sendube interesaj, precipe por katolikoj, la revuo celas esti "renkonto-punkto... por tiuj, kiuj sin sentas kristanoj" kaj kiuj "ekagas por atesti Kriston en unueco inter si kaj kun la paŝtistoj starigitaj de Kristo". La jarabono estas 29 steloj.



LA JUNA VIVO


Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al:
Heinrich Reiter, Van der Nüllgasse 100/10/15
Wien X, Aŭstrujo.

7-a INTERNACIA SKIFERIO DE T.E.J.O. EN FILZMOOS

La 7-a skiferio de TEJO estis samtempe sukceso kaj malsukceso: Malsukceso, ĉar partoprenis ĝin entute nur 22 gejunuloj el 6 landoj (Aŭstrujo, Germanujo, Belgujo, Svisujo, Italujo kaj Abesinio) kaj ĉar neniuj krom la unua etapo povis iĝi reala pro manko je aliĝoj; malsukceso ankaŭ, ĉar pro la malmultaj gepartoprenantoj la financa bazo estis iom malforta. Des pli en ĉiuj aliaj rilatoj oni povas paroli pri brilaj sukcesoj: Dum ĉiuj 12 tagoj de la aranĝo estis belega vetero kaj bona — tamen ne tro multa — neĝo. Ni faris tri grandajn

skiekskursojn (inter ili unu per tak-sibuso al Radstaedter Tauern), kiuj restis al la gepartoprenintoj en agrabla memoro. Okazis neniam gravaj akcidentoj. La vesperoj estis gajaj kaj amuzaj ĉe danco, kantado aŭ ludado. Por klerigo estis aranĝitaj por-komencanta Esperanto-lecionoj kaj dumlumbildparoladoj. Post kvarfoja rendevuo en Filzmoos ni nun adaŭis nin de la Dachstejn- kaj Bischofsmütze (= episkopa ĉapo) -montaroj. La apudaj bildoj montras parton de la vilaĝo kaj skiejo Filzmoos, esperantistano ĝe-junularon kaj tre inteligentan neĝ-urson.

Por la venonta vintro jam nun estas rezervita domo en la ege internacia, fama skivilaĝo Saalbach (proksime de Zell am See. La prezo ne estos pli



alta ol ĉijare kaj oni povos elekti en Saalbach inter multegaj seĝ- aŭ tren-liftoj longaj kaj mallongaj. Jam ek de tuj oni turnu sin por varbmateria-loj kaj detalaj informoj kiel ankaŭ kun sugestoj al la redaktoro de LJV, laŭeble aldonante internacian respondekuponon. Bonvolu jam nun ek-interesigi viajn gamikojn por la venontvintra skiferio, por ke ili rezervu libertempon!

Heinrich Reiter

5-a Internacia Seminario de GEJ en Köln

Krom salutkartoj, skribita de nia prezidanto Günther Becker en Köln al Filzmoos, atingis min ĝis nun jena mallonga informo: "...La 5-a Internacia Seminario de la Germana Esperanto Junularo havis bonan sukceson. Ĉeestis pli ol 60 gejunuloj el 13 landoj, okazis tre altnivelaj prelegoj de la profesoroj d-ro Lapenna kaj Laŭrat. Kaj la silvestra balo daŭris ĝis la 7-a matene. Mi bedaŭrinde ne povis partopreni".

Richard Reuchlin

El Polujo venis jena saluto al la tutmonda esperantista junularo:

"Silvestra Nokto 1961/62". La Esperantista Junularo en Chorzów aranĝis tritagan ekskurson al la montaro. Partoprenis 30 personoj el Chorzów, Bytom, Zabrze, Mikotów, Biełko kaj Cieszyń. Nun ni estas jam en la rifuĝejo sur la monto Skrzyczne (skjicne) kaj baldaŭ salutos — kompreneble en gajo — la Novan Jaron 1962. Niaj pensoj estas ankaŭ ĉe vi! Akceptu de ni la plej korajn novjardezirojn!

Irene Skorupa, Chorzów - Batory, ul. Wroclawska prezidantino".

Esperanto en lernejo de Bulgarujo

La loka esperanta societo "Nova Epoko" aranĝis komence de la nova lernejjaro grandan Esperanto-ekspozicion ĉe la Agronomia Teknikumo de Tabako — Peŝtera, Bulgarujo. Ĉefe oni montris sciencajn kaj literaturajn verkojn, krome gazetojn el tutmondo. Rezulte de ĝi 10% de la tuta ĝelernantaro deziris eklerni Esperanton. Kiel prezidanto la subskribinto proponis al la direktoro K. Mindizov kaj al la pedagogia konsilantaro, subtenita de la loka partia organizo, la fakultativan enkondukon de Esperanto. La decido estis ĝustatempa kaj pozitiva. Enskribiĝis 50 ĝelernantoj. La instruado okazas laŭ la rekta metodo. Nun la ĝelernantoj, 15-17-jaruloj, serĉas ĝekorespondantojn. Precipe estas dezirata kontakto kun specialistoj pri tabako; oni volonte kolektus fotojn,

semojn, librojn k.a. Skribu al la instruisto :

Agr. Sterjo Zaf. Kukušev -
Teknikumo de Tabako
Str. "Oberiste" 15, Peštera,
Bulgario

Krucvortenigmo

Venis multaj solvoj el multaj landoj. Ĉar ĉiuj solvoj estis tute ĝustaj, ne estas necese, publikigi la solvon. Ĉe la lotumo de la premioj la sorto ĉifoje decidis jene: 1a premio: V. Beškarev, Gorjkij (USSR); 2a premio: Frato Paŭl Durette, F.C., Montreal (Canada); 3-a premio: Joel Silverman, New York (USA). La libro-premiojn ni ricevis donace de s-ano kortega konsilisto Hugo Steiner, direktoro-fondinto de la Internacia Esperanto Muzeo en Wien. En la venonta n-ro aperos nia tria enigmo. La redaktoro tre kore dankas pro la ricevitaj sendaĵoj, salutoj kaj sugestoj.

Raporto el Hispanujo.

La Hispana Esperanto Junulara Sekcio (H.E.J.S.) organizis ekskurson sur la monton San Llorenç de Munt, en la provinco Barcelono. Partoprenis gejunuloj de tri urboj, nome Man-

resa, Barcelona kaj Cornellá. La apuda bildo montras la ekskursintojn. Alia ekskurso sur la monton Montserrat (1200 m) pro malbona vetero nur estis frekventita de ses gepartoprenintoj.

Gejunuloj de la Madrida Esperanto Klubo organizis korbopilkludan gru-

pon, kiu jam komencis ludi kontraŭ aliaj ludantaroj. Ĉiun semajnon oni povas legi pri ili en la sporta ĵurnalo "Marca" de Madrid. La nomo de la sportula grupo estas "Esperanto".

Salvador Aragay
Arce n-ro 8-2-4a, Cornella
(Barcelona)

POR LA NOVA DOMO DE U.E.A.

Kun ĝojo ni povas informi ke multaj jam reagis al la artikoloj pri la nova domo en la lastaj numeroj de "Esperanto", ke organizaĵoj kaj individuaj membroj vere sentas la novan domon kiel sian, deziras ke ĝi enhavu ankaŭ ion konkretan de ili kaj grandanime sendas siajn kontribuojn. Por doni ekzemplon pri la spirito kiu regas la donacantojn, ni kun plezuro ĉi tie citas unu el ili:

"Dum sia jarkunveno la 5-an de februaro 1962 nia grupeto bonvenigis la artikolon de s-ano E. J. Woessink en la januara n-ro de "Esperanto" pri la nova domo de U.E.A. Vi estas la fundamento de nia Movado kaj devas resti firma. Bonvolu akcepti nian kontribuon gld. 50.—, kiun ni samtempe ĝiras al vi. U.E.A. prosperu je la beno de l'homaro! Sincere Esperanto-Grupo Tailfingen".

Volonte ni rekomendas ĉi tiun belan ekzemplon je la favora konsidero de aliaj kluboj aŭ personoj!

MENDU JAM NUN VIAN KALENDARON 1963!


Vere belegan kalendaron tute en Esperanto, en formato 32 × 27 cm., kun 12 kolorbildoj pri svisaj scenoj (kiuj surdorse portas klarigajn tekstojn en Esperanto), eldonis por la jaro 1962 s-ro Karl-Heinz Mischler en Zürich. Tehnike perfekta, artisme senriproĉa propagandilo, kiu estus nepre rekomendinda al niaj legantoj — se la tuta eldonkvanto ne estus jam elĉerpita!

Sed s-ro Mischler jam nun planas similan eldonaĵon por la jaro 1963, kaj li invitas viajn antaŭmendojn. Volon-

te ni rekomendas al tiu invito vian atenton.

La eldono ne estas komerca entrepreno. La profiton el la pasintjara vendado s-ro Mischler donacis al diversaj movadaj fondaĵoj, kaj ankaŭ venontjare li tion faros. La kalendaro 1963 kostos sv. fr. 4 (ĝis la 30.4.62) kaj post tiu dato sv. fr. 4.50, por mendintoj, kiuj loĝas en Svislando. Eksterlandanoj povas mendi ĝin je sv. fr. 4.50 aŭ 9 rpk (ĝis 30.3.62), aŭ post tiu dato je sv. fr. 5 aŭ 10 rpk., kio inkluzivas registritan afrankon. Estas atentinde, ke la sama kalendaro, sed kun neesperanta surskribo kaj sen dorsflankaj tekstoj, vendiĝas en Svislando je sv. fr. 6.50). Mendojn el eksterlando nepre akompanu la pago.

La kalendaro estas mendebla rekte de s-ro Karl-Heinz Mischler, Franklinstrasse 29, Zürich 50, Svislando, kiu ankaŭ sendos mendilon kontraŭ peto.



Akademiano Delfi Dalmau (maldekstre) akceptas s-ron Llech-Walter, Prezidanton de Franca Unio, Komitatano de UEA (meze) post liaj prelegoj en Manresa kaj Moyà. La filo de s-ro Dalmau partoprenis la akcepton (dekstre).

Zra la Mondo

Aŭstrujo

- La telefonlibro de Linz/D kaj Supra Aŭstrujo enhavas rubrikon "Esperanto", aranĝita de Joh. Gerold-

münchen 185 X 42 1 05

ESPERANTO.

BERGER Hans, BB-Insp. i. R.,
vicestro de AFEF-sekr. Linz X

25 80 62

GERBERT Helmut, Wirkl. Amtsrat
i. R., U. E. A.-Del. X 31 95 84

GEROLDINGER Johann, sekretario
de AFEF-sekc. Linz X 41 95 55

dejure: 26 81 15 030

au 26 81 15 032

KASSECKER Leopold, Dr., Hofrat,
BB-Präsident 26 81 15 300

NAMORS Anna X 25 27 41

RAMETSTEINER Karl X

25 86 22

TSCHOM Friedrich, Dipl.-Ing., BB-
Baurat, estro de AFEF-sekc. Linz

26 81 15 335 (dejure)

Espernberger Edeltraud,

Hauptschulherlehrer, Riesenhof-
straße 3/1 31 98 72

Espernberger Heinrich,

dinger laŭ la ekzemplo de la esperant-
istoj en Genève (Svislando).

Britujo

- La 46a Brita Kongreso de Esperanto okazos en Southport de la 20a ĝis la 23a de aprilo, 1962. Southport estas unu el la unuaj planitaj ĝarden-urboj en Britujo. Vera paradizo por la feriantoj. Situas sur la okcidenta bordo de Britujo, 30 km. for de la mondfama granda havenurbo Liverpool. Samideanoj el eksterlando ricevos kongreskarton senpagan. Libreto pri gastejoj sendota laŭ peto al la sek.: S-ro J. Steele, 22 Gosforth Road, Southport, Lancs.
- 30 11-jaraj gejunuloj komencis studi Esperanton en lernejo. Sendu salutojn kaj gratulojn al: Lady Lumley's School, Pickering, Yorks., Anglujo.

Ĉeĥoslovakio

- Ing. Berthold Guttmann, Horská Bystřice 296, Dubí 2 u Teplic, D kaj FD de UEA, la 23-an de februaro festis sian 60-an datrevenon kaj samtempe memoris sian esperantistigon antaŭ 40 jaroj. En ofte malfacilaj cirkonstancoj li ĉiam sinofere dediĉis sin al poresperanta laboro, precipe en sia regiono. Tre varmajn gratulojn al li!

Francujo

- Bona ilo por nia propagando. Oni scias, ke por multaj esperantistaj grupoj estas malfacile organizi grandan ekspozicion. S-ro Lentaigne fotografis sian ekspozicion kaj pere de diapozitivoj oni povas projekcii, kaj sonbendo donas la klarigojn. Tio okazas

francingve, sed en ĉiu lando oni povas agi same kaj havi tiamaniere bonegan materialon, kaj ne pezan, por la propagando. S-ro René Llech-Walter, Prezidanto de UEF, prezentos tiun ekspozicion dum la Kultura Semajno en Grésillon (16-23 aprilo, 1962).

- Aŭstralia esperantisto, S-ro Jack Hawks, vizitis pli ol dudek landojn, okaze de rondvojaĝo. En Bourbourg (Nord), S-ro Hawks konkludis sian paroladeton dirante: "Se troviĝas ĉitie vojaĝemuloj, ili same kiel mi vizitu la mondon kaj ili vere tuŝu — per la fingro — la praktikan utilecon de la L.I."

- La Akademio de Arras oficiale akceptis novan membron. Temas pri S-ro Philippe, arkitekto, honora prezidanto de Franca Unuiĝo Esperantista. En sia dankprelego, S-ro Philippe akcentis la valoron kaj utilecon de esperanto. Inter la eminentuloj, kiuj ĉeestis la publikan kunsidon, ni rimarkis la katolikan episkopon kaj

la help-urbestron.

- Rotari-klubo en Aire-sur-la-Lys invitis S-ron Contard, kiu prelegis pri Esperanto kaj montris ekspozicion.

- Internacia Foiro de Lille havos esperantistan tagon, kiu okazos la 22an de aprilo. Invitilojn sendas la organiza komitato — Esperanto, 21 rue Gambetta, Noyelles-Godault (Pas-de-Calais).


- Por reeldoni kiel eble plej baldaŭ la verkojn de Zamenhof, Esperantaj Francaj Eldonoj invitas la subtenon de nepre ĉiuj esperantistoj. EFE ĵus eldonis poŝtkarton kun portreto de Zamenhof, kaj la profitoj el ĝia disvendo estos dediĉitaj al la supre menciita celo. 10 ekzempleroj kostas 2 NF 27, aŭ 7.8 stelojn; 20 kostas 5 NF, aŭ 14 stelojn (inkluzive afrankon). EFE (rue P. Vergnes, Marmande, Francujo) invitas ankaŭ kunlaboradon de perantoj, kiuj ricevos rabaton.

Hispanujo

- Omaĝo al d-ro Zamenhof en Bar-

STATISTIKO PRI LA MEMBRARO 1961

Lando	AM	MJ	MA	MS	Pat.	DM	HM	J-MJ	J-MA	Sumo
Acoroj	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2
Alĝerio	—	4	7	1	—	1	—	—	—	13
Angolo	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2
Antiloj (ned.)	—	—	1	1	—	—	—	—	—	2
Argentino	460	—	44	1	—	12	—	—	—	517
Aŭstralio	108	9	83	9	—	20	—	—	3	232
Aŭstrujo	440	20	87	2	—	3	3	—	1	556
Belgujo	421	24	128	11	—	5	1	—	2	592
Bermudoj	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Bolivio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Brazilo	687	46	227	59	1	31	1	1	3	1056
Britujo	956	85	394	70	—	66	3	6	16	1596
Bulgarujo	3250	1	99	—	—	3	—	—	1	3354
Cejlono	—	—	1	—	—	2	—	—	—	3
Cipro	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Ĉeĥoslovakujo	—	2	130	—	—	3	3	—	1	139
Ĉilio	—	—	3	—	—	—	—	—	—	3
Ĉinujo	—	—	3	—	—	—	—	—	—	3
Danlando	816	24	154	24	—	5	1	—	4	1028
Etiopujo	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Filipinoj	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Finnlando	64	46	213	7	—	2	1	—	6	339
Francujo	1524	71	424	29	—	35	8	8	11	2110
Gabono	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Germanujo	1700	70	428	36	—	21	1	4	12	2272
Grekujo	—	—	8	—	—	—	1	—	—	9
Gvatemalo	—	—	5	—	—	—	—	—	—	5
Havajo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Hindujo	—	1	10	—	—	—	—	—	—	11
Hispanujo	422	21	184	11	—	5	—	—	3	646
Hongkongo	—	—	—	—	—	1	—	—	—	1
Hungarujo	—	—	70	1	—	—	3	1	2	77
Indonezio	—	—	2	—	—	1	—	—	—	3
Irano	—	—	—	—	—	2	—	—	—	2
Irlando	—	1	3	—	—	1	—	—	—	5
Islando	—	—	19	1	—	3	—	—	—	23
Israelo	—	1	22	—	—	4	—	—	1	28
Italujo	1218	27	253	13	—	4	1	1	18	1535
Japanujo	1200	16	179	—	—	—	1	7	16	1419
Jugoslavio	3500	26	168	8	—	14	—	—	13	3729
Kameruno	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Kanado	26	8	50	8	—	4	—	—	1	97
Kenjo	—	—	1	—	—	1	—	—	—	2
Kolumbio	—	—	4	—	—	—	—	—	1	5



*Prelegas japana
s-ano Yutaka
Waseda en Moyá
(vidu sub
"Hispanujo").*


celona. Por inde festi la datrevenon de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto, marmora tabulo estis malkovrita sur la fasado de la "Lerneja Grupo Juan Antonio Parera", str. Zamenhof. Flankentiris la kurteneton s-ro Rekaredo Gómez Cortéz, estro de la sindikata fako "Kultura Disvastigado". La Prezidanto de la Instituto

de Esperanto, s-ro Jaime Aragay, parolis pri diversaj travivaĵoj kaj aspektoj de la kreinto de Esperanto. Orkestro "Montserrat" prezentis ses sardanojn (katalunajn dancojn). Vespere, la teatra ensemblo de Instituto de Esperanto prezentis faman damon de Don Angel Guimerà, "Malsupra Tero", tradukita de s-ro Rikardo S. Güell.

Lando	AM	MJ	MA	MS	Pat.	DM	HM	J-MJ	J-MA	Sumo
Kongo eks-belg.	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Kongo eks-franc.	—	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Koreo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Kostariko	—	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Kubo	—	—	1	—	—	1	—	—	—	2
Kuvajto	—	—	—	—	—	1	—	—	—	1
Libano	—	—	1	—	—	—	—	—	1	2
Liĥtenstejno	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2
Luksemburgo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Madagaskaro	28	4	11	4	—	—	—	—	3	50
Makao	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Malto	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Maroko	—	—	6	4	—	4	1	—	5	20
Maŭricio	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Meksikio	—	1	18	—	—	1	—	—	—	20
Monako	34	1	5	—	—	—	—	—	—	40
Mozambiko	—	—	3	—	—	—	—	—	—	3
Nederlando	662	62	351	24	—	32	4	—	5	1140
Nepalo	—	—	4	—	—	—	—	—	—	4
Nigerio	—	—	2	1	—	—	—	—	—	3
Norvegujo	520	10	98	13	—	7	1	—	4	653
Nov-Zelando	214	27	73	7	—	12	—	—	1	334
Pakistano	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Polinezio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Pollando	3100	3	318	—	—	1	1	—	4	3427
Portoriko	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Portugalujo	—	—	44	5	—	4	2	—	—	55
Rumanujo	—	—	18	—	—	—	1	—	—	19
Salomonaj Ins.	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Samoa Ins.	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Senegalio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Sieraleono	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Singapuro	—	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Sovetunio	—	3	141	2	—	2	—	—	1	149
Sudafriko	—	3	14	2	—	5	—	—	—	24
Svedujo	1435	119	326	81	1	27	—	1	10	2000
Svislando	113	73	137	9	—	38	3	1	2	376
Tajlando	—	—	—	—	—	1	—	—	—	1
Trinidado	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Turkujo	—	—	13	—	—	—	—	—	—	13
Un. Araba Resp.	—	—	1	—	—	2	—	—	—	3
Urugvajo	50	1	11	—	—	1	1	—	—	64
Usono	315	38	225	37	—	30	1	2	19	667
Venezuelo	—	—	17	1	—	—	—	—	—	18
88 landoj	23263	851	5267	485	2	418	43	32	170	30531

● **Esperanto-grupo Moyá.** La 23an de novembro en la publika Biblioteko de la loka ŝparkaso s-ro René Llech-Walter el Perpignan (Francujo) prelegis sub la titolo "De la nuboj de Nederlando ĝis la suno de Rusilono" kun koloraj diapozitivoj. S-ro Dario Rodríguez el Madrido akompanis s-ron Llech-Walter. La 28an de decembro je la sama loko s-ano Yutaka Waseda el Nagoya (Japanujo) prelegis pri la temo "Japanujo, rava lando", ankaŭ kun diapozitivoj. Ambaŭ prelegojn tradukis por neesperantista publiko s-ro Molera.

● **La Esperantista Societo de Tenerifo (Kanario),** okaze de la Zamenhof-Tago, malkovris la tabulojn, kiuj portas la nomon Calle Dr. Zamenhof en la nova kvartalo de La Laguna.



Oni profitis la okazon por informi la loĝantojn de la strato pri la personeco de d-ro Zamenhof per disdonado de flugfolio.

Italujo

● **"Valtellina kaj Spluga"** nomiĝas turisma kolora broŝureto kun aparta folio en Esperanto, enhavanta poezion "La lingvaĵo de Valtellina". Kolora faldfolio kun detala plano de la montaro kaj de la provinco. Havebla senpage. Petu ĝin kaj pliajn informojn, skribante esperantlingve al: "Ente Provinciale del Turismo", Via Piazza, 19, Sondrio, Italujo.

Nederlando

● **S-ro C. Nelson,** Vijverweg 27, Dordrecht, D kaj FD de UEA, festos en majo sian 40-jaran esperantistecon. Ni kore gratulas pro tiu jubileo de fidela kaj sinofera esperantisto. S-ro Nelson, kiu estas prokuristo en granda entrepreno, ofte havis okazon en diversaj medioj informi pri Esperanto. Grandparte dank' al li Dordrecht ĵus ricevis Zamenhof-aleon en bela nova urbo-parto.

ESPERANTISTA VIVO

Sian 50-jaran esperantistecon festis s-to **Jules Leburgue**, 66 rue J.B. Delescluse, CROIX (Nord), Francujo.

★

NEKROLOGO

La 22an de novembro mortis en Barcelona s-ino **Fernanda Viñas**, edzino de nia samideano Conrado Berghaenel. Kun sia edzo ŝi partoprenis diversajn kongresojn k.s.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj onlongoj vidu la januaran numeron.

KOREKTO de preseraro en la januara tabelo: Ĉiun ĵaŭdon, la programo de la Svisa Radio en Bern estas dissendata de 21.15 ĝis 21.25 per ondoj 48.66m., 31.46m., 25.61m., 19.60m., kaj la stacio Zagreb elsendas de 22.05 ĝis 22.20 per ondoj 264m. (1135 kcs).

RADIO SOFIA nun elsendas per ondoj 48.62m. kaj 39.11m. de 19.00 ĝis 19.25; per ondoj 30.93m. kaj 25.32m. de 22.30 ĝis 22.55.

RADIO ROMA. 2-III, la dia admono de la Cindromerkredo; 0-III, Tra la literaturo; 9-III, Leterkesto kaj bibliografio; 13-III, la problemo pri la latina lingvo en la italaj mezgradaj lernejoj; 16-III, Italaj belartaj urboj: Ravenna; 20-III, Italaj kanzonoj en Esperanto; 23-III, Grandaj sanktuloj: S-ta Benedikto el Norcia; 27-III, Novaĵoj el Italujo; 30-III, Famaj virinoj en Italujo: Kristina el Svedujo. Krome, ĉiun merkredon, Kuriero de Esperanto.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

NIEUWE BINNENWEG 176 - ROTTERDAM-2 - NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO N-ro 346

(Pro spacomanko ni publikigos la statistikon nur de tempo al tempo)

DELEGITOJ

Brazilo

Rio de Janeiro (Distrito Federal) FD (Turismo): vakas.

Danlando

Aast (Jylland) D: vakas

FD (Instruado al idiotoj): vakas.

Rønne (Bornholm) VD: vakas.

FD (Bibliotekoj): vakas.

Finnlando

Helsinki (Uudenmaan lääni) FD (Numismatiko): S-ro Ahto Linja, masonisto, Pengerkatu 29 B 50.

FD (Vegetarismo): vakas.

Rovaniemi (Kaski-Lappi) D: S-ro Toivo Pölönen, instruisto, Porokatu 5.

Francujo

Baugé (Maine-et-Loire) D: vakas.

Paris VD: vakas.

Saint-Etienne (Loire): FD (Komerco): vakas.

Saint-Laurent-de Brèvedent (Seine Maritime) D: vakas.

Germanujo

Giessen/Lahn (Hessen) D: vakas.

FD (Forstistaj aferoj): vakas.

Hamburg D: vakas.

Moenchengladbach (Norda Rejnlando) D: vakas.

FD (Esperantoinstruado): vakas.

FD (Vegetarismo): vakas.

Münster (Westfalen) D: vakas.

Sovet-Unio

Batumi (Gruzinskaja SSR) D: S-ro M. V. Perminov, financrevizoro, ul. Ninošvili 11, gostinica "Inturist" Buro obslujivaniĵa.

Moskva FD: (Botaniko): S-rino L. G. Suetova, Botanikistino, Malaja Kaluĵskaja 12, kv. 45, Moskva, B-71.

Omsk (Rossijskaja SFSR) D: V. V. Kulikov, instruisto pri matematiko en altlernejo, 7, Sazonova 33.

Torĵok, Kalininskoj obl. (Rossijskaje FSSR) D: S-ro F. A. Klem, eksinstruisto, Grajdanskaja 1, kv. 3.

Svedujo

Norrköping (Östergötland) VD: vakas.

Svislando

Zürich FD (Aviado Komerca): vakas.

Usono

Missoula (Montana) D: vakas

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Hirsch, R., Bad Hersfeld, Germanujo.
Magaña Erosa, D-ro P., Mexico, Meksikio.

MEMBRO-SUBTENANTO 1961

480. Fóscolo, D-ro H., Pompeu, Brazilo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1962

76. Prince, S-ro A., Letchworth, 77. Ryan, S-ino J. S. Manchester, 78. Shield, W. J. Birkenhead, 79. Westmancote, S-ro W. F., Bristol, Britujo; 80. Frey, S-ro H. H., Frederikshavn, 81. Jensen, S-ro H. E., Toustrup, Sorring, 82. Larsen, S-ro L., Odense, 83. Møller, S-ino E., Vester Nebel, 84. Olesen, S-ro T., Århus, 85. Rasmussen, S-ro H. V., Lyngby, 86. Riisbjerg, F-ino G., København, 87. Sand, F-ino E., Kolding, 88. Vaarst, S-ro E., Vejgaard/Aalborg, 89. Ziegler, S-ro S., Vanløse, Danlando; 90. Vuori, S-ro A., Särkisalo, Finnlando; 91. Bernard, S-ro R., Bois-Colombes, 92. Trésorier, S-ino J., Besançon, Francujo; 93. Bily, S-ro H., Berlin, Germanujo; 94. Siraki, S-ro K., Ibuki-mura, 95. Worcester, S-ino D. M., Kyoto-Fu, Japanujo; 96. Cool, S-ro G., Utrecht, 97. Coppens-Bink, S-ino A. B. M., Rotterdam, 98. Luyke, S-ro H. C., Katwijk a/Zee, 99. Slot, S-ro R., Zeist, 100. Verloren van Themaat, S-ro W. A., Amsterdam, Nederlando, 101. Fygle, S-ro B., Bodø, 102. Maarli, S-ro E., Bodø, Norvegujo; 103. Kuhn, S-ro G., Zürich, Svislando; 104. Barta, S-ro R., Denver, 105. Carlson, S-ro F., Seattle, 106. Colt, Sgt. B., San Francisco, 107. d'Estries, S-ino M., Bay Shore, 108. Dillinger, S-ro H. E., Placerville, 109. Gould, S-ro W. H., Greenfield, 110. Lome, S-ro A., Golden's

Bridge, 111. Regal, S-ro A. E., Downers Grove, 112. Regal, F-ino J. L., Downers Grove, Usono, 113. Collier, S-ro J., Birmingham, 114. Cross, S-ino D., Leicester, 115. Fraser, F-ino R.G.M., Ilford, 116. Fraser, S-ro T.C., Kirkcaldy, 117. Higham, S-ro W.H., Southport, 118. Mallett, F-ino E.E., Edgware, 119. Middlemast, S-ro Arthur H., Bournemouth, 120. Murruj, S-ro J.P.W., Fochabers, Morray, 121. Phelan, S-ro H.K., Old Bexley, 122. Rapley, S-ro J.C., Ruislip, 123. Relf, S-ro E.F., Addlestone, 124. Saft, S-ro S., Salford, 125. Sinclair, F-ino C., Methil, 126. Smith, S-ro Norman R., London, 127. Solar, F-ino A., London, 128. Withey, S-ro D.H., Liverpool, 129. Zeiner, S-ro B.R., Barry, Britujo; 130. Hansen, S-ro E., København, 131. Hou, S-ro C.H., Hillerød, 132. Jahn, S-ro C.J., Brønshøj, 133. Jørgensen, S-ino A., Vejle, 134. Møller, S-ro Poul, Viborg, Danlando; 135. Pykönen, S-ro J., Lauritsala, Finnlando; 136. Bideau, S-ro A., Dipjon, 137. Llech-Walter, S-ro R., Perpignan, 138. Llorens, S-ro R., Montélimar, 139. Luez, S-ro D., Laan, 140. Maillard, D-ro G., Bourg-la-Reine, 141. Ploussu, S-ro A., Grenoble, 142. Yelland, S-ro E.E., Aspremont, Francujo; 143. Berger, S-ro J.G., München.

FONDAJO DOMO

"Hoĉjo", Britujo, 10.— gld; Prof. I. Lapenna, Britujo, 50.— gld; E. J. Woessink, Nederlando, 50.— gld; S-ino H. Bouman, Nederlando, 5.— gld.

DONACOJ AL A.P.O.

S-ro J. Chambers, Britujo, 21.13 gld., N.N., Britujo, 50.30 gld.

DONACOJ AL ĜENERALA KASO

S-ro E. Richter, Germanujo, 5.50 gld., S-ro A. Wesser, Usono, 5.75 gld.

Al la donacintoj tre koran dankon.

Direktorino C.O.
M. H. Vermaas,

ANONCETOJ

AVERTO! Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmarkkolektantojn.

Franca Pirena Montaro, turisma gvidlibreto. Mendebla: libroservoj, Eldoninto: M. Rétot, 162 Aristide Briand, Montreuil (Seine), Franclando. 4 Rpk aŭ 2 NF al Poŝtkonto: Paris 1042-07.

Propagande ĝojigu novzelandan infaninstruistaron okaze de sia 21-a naskiĝtago majon. Tiu, kiu sendos bildkarton aŭ belajn (precipe infaninstruizeblan) ricevos belegan bildkarton novzelandan. Skribu klare al F-ino J. E. Cooke, 114 Idris Road, Christchurch, Novzelando.

Esperanto-Civito. D-Soleo nun respondas leterojn 20-ope en cirkulera "forumo". Por ne tro longe atendigi, skribu amase. Privataj respondoj laŭ pete. — 14b Castle Avenue, Dover, Britujo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj Dieter Kremp, Kastell-

strasse 17, (17a) Karlsruhe-Durlach, Germanujo.

Deziras korespondi pri literaturo, lingvaj aferoj, filmarto kaj arto ĝenerale 23-jara instruisto kun esperantistoj preskaŭ samaĝaj. H. M. Schippers, Van Humboldtstraat 42 bis, Utrecht, Nederlando.

Esperantistoj deziras korespondadojn en ĉiuj landoj. Skribu al S-ro F. E. Hunsche, Brochterbeck, Westfalen, Germanujo.

Motiv-Poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj interŝanĝas: H. Khel, Pivonková 2124, Praha 10, Ĉeĥoslovakio.

Serĉas en la tuta mondo filatelistojn por interŝanĝi poŝtmarkojn laŭ katalogoj Pavel Dobiáš, Markova 1111, Frenštát, Ĉeĥoslovakio.

Ni ekkomencis kurson de Esperanto. Ni petas la tutmondan esperantistaron sendu amase belafankitajn salutleterojn kaj bildkartojn. Adreso: Unión Excursionista Manlleu Enrique Delaris, 46 — Manlleu (Barcelona), Hispanujo. Ni nepre respondos per belkolorbilda pkto.

Por helpi disvastigi nian lingvon, sendu infandeseĝnaĵojn al la peranto de

MIGRANTA EKSPONIZIO — S-ro J. Montfort, Apartado 19.003, Barcelona, Hispanujo.

Grava hispana revuo pri modernaj konstruaĵoj deziras akiri fotojn kaj artikolojn pri nova arkitekturo. Rekompencos laŭdezire. Respondo garantiata. S-ro Johano Farré Sierra, Ronda General Mitre. 107, Barcelona 6, Hispanujo.

Belan frontispicon havas "William Penn", majstra prelego de Prof. E. Privat pri paca pioniro. 4 rpk. aŭ steloj. Kvakera Esperantista Societo, 5 Cotham Park North, Bristol 6, Anglujo.

Deziras korespondi kun la tuta mondo, precipe amerikaj landoj, kaj interŝanĝi pm, pk, ĵurnalojn 17-jara fraŭlo: Georgi D. Livorov, *Gabrovo*, Golo Bardo, Elha 11, Bulgarujo.

BENELUKSA KONGRESO

HAGO 9-10-11 junio 1962
Ĉu vi jam aliĝis? Adreso: S-ino I. Dijkhoff, Van Trigtstraat 20, Den Haag, Nederlando.

Lastmomente

NOVA BONEGA IDEO — TRIA ĈAMBRO HAVIGOTA

De nia membro Sinjoro A. M. Brya en Urbana (Illinois), Usono ni ĵus ricevis donacon de 1667.— ned.gld. por la nova domo. Ni plej kore dankas al li pro tio. Sed estas pli. S-ro Brya informis, ke li intencas, se eble, sendi samajn sumojn en februaro 1963 kaj en februaro 1964, tiel ke estos senditaj entute 5000.— gld. Volonte ni rezervos por li ĉambron kiu, kiel ni esperas, post du jaroj portos la nomon "Ĉambro Broje", laŭ la iama familia nomo de S-ro Brya.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj

LA UNIVERSALA KONGRESO 1963 EN SOFIA

Ĝuste antaŭ presigo de tiu ĉi paĝo la Estraro de U.E.A. per skriba voĉdono decidis akcepti la inviton de Sofia okazigi la U.K. en la venonta jaro en tiu urbo. Pliaj informoj sekvos en la venonta numero.

FORPASO DE DOKTORO WAYSBLUM

Ĵus atingis nin la malĝojiga informo ke D-ro Marek Waysblum, doktoro pri filozofio kaj historiisto, multjara fidela membro de U.E.A. kaj unu el la plej elstaraj kunlaborantoj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, aktiva ekde ĝia fondiĝo en januaro 1952, forpasis la 19-an de februaro pro koratako. La Estraro de U.E.A. kaj CED esprimas al Sinjorino Waysblum kaj al la familio sian profundan kondolencon.

TIU ĈI NUMERO ESTAS LA LASTA

KIUN VI RICEVAS ĜIS VI ESTOS PAGINTA VIAN KOTIZON 1962.

ZORGU, KE NENIU NUMERO MANKOS AL VI: DO, SE VI FORGESIS ĜIS NUN,

PAGU TUJ!

ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kastelo G R E S I L L O N

Baugé (Maine-et-Loire)
Francujo

SOMERA PROGRAMO 1962

- 1-a periodo : 3 julio-17 julio
Kulturaj Internaciaj Ferioj
- 2-a periodo : 18 julio-8 aŭgusto
Esperanto-Studado
- 3-a periodo : 9 aŭgusto-30 aŭgusto
Kulturaj Esperantistaj semajnoj
- 4-a periodo : 31 aŭgusto-15 septembro
Studperiodo organizita de U.E.F.
- Petu detalojn de Kastelo "Grésillon", Baugé
(Maine-et-Loire), Francujo

AL ĈIU ESPERANTISTO : PROSPERIGAN NOVAN JARON !

Pro multokupiteco kaj tro ofta vojaĝado, mi devas sciigi je mia granda bedaŭro la informpetintojn ke mi — kontraŭvole — ne havas la tempon korespondi.

Ankaŭ la Esperanto movado en Hongkong ankoraŭ estas en embria stato kaj sekve ne ankoraŭ troviĝas korespondantoj en Hongkong.

Al seriozaj informpetantoj mi certe daŭrigos mian laŭeblan devon kiel delegito.

Bonvolu noti adresŝanĝon :

Dirk M. Brink

Officeje :	Hejme :
203 Shell House	49-A, Shouson Hill Rd.
Hongkong	Hongkong
Tel. : 23936	Tel. : 92248
Telegramadreso: ESPERANTO HONGKONG	

MODERNA NATURISMO

La vojo, la vero, la vivo

Informoj ĉe : INFE-sekretario Leif
Heilberg, 1801 Page, San Francisco 17,
Calif., Usono.

Helsingör

loko de la Antaŭkongreso 29/7 — 4/8 kaj de la Feriaj Kursoj. Prelegoj, distrado kaj ekskursoj. La internacia Altlernejo estas la antaŭkongresejo. Senpage ni sendos al vi nian programon kaj invitas vin plej kore.

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.

10-a Internacia Esperantista Ferio-Semajno 12-20 Aŭgusto 1962 en Krommenie, Nederlando

La Esperanto-grupo "Unueco" en Krommenie kore invitas la esperantistajn unuopulojn, kaj grupetojn partopreni en la 10-a internacia-Esperantista Ferio-semajno, kiu samtempe estos Jubilea-Semajno kaj en ĉi tiu jaro okazos dum la tagoj 12-20 Aŭgusto. En la programo ni prezentas: Interkonatigan-vesperon, allogajn ekskursojn aŭtobuse kaj ŝipe al la plej gravaj vidindaĵoj de Nederlando. Ĉiuj partoprenantojn gastos senpage en la hejmoj de lokaj gesamideanoj, tial la partoprenokostoj estas nur 55,— gld. (estas 220 steloj) por la tuta semajno. Ĉi tiu sumo entenas ankaŭ la kostojn de ĉiuj ekskursoj. La limdato de la aliĝo, estas 1-a de Majo, 62. Detalajn informojn volonte donos nia sekr.ino; J. A. v. d. Meulen, Popelstraat N. 13, Krommenie.

VERDA STELO

Tute nova vilao en la pinarbaro de Punta Marina (Ravenna) ĉe la adriatika marbordo. Lueblaj apartamentoj de majo ĝis septembro dum 2, 3, 4 semajnoj kun 3, 4, 5 litoj po ĉiu. Enirejo, kuirejo, banejo sendependaj.

Posedanto : Bagnoli rag. Stefano. UEA-FD.
Via Ravegnana 152 - Ravenna
tel. 25670 (ITALIO)

La 4-a Internacia Feriosemajno en Svislando okazos de la 2a ĝis 8a de septembro 1962 sur **Oberbalmberg**.

Agrabla restado; interesa ekskursprogramo, modera prezo.

Petu detalan programon de Hans Hunkeler, poŝtfako 417, A A R A U.